

1980 januaro

73-a jaro

n-ro 889(1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto


ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

V-4252/73 (1980)

esperanto

Internacia
Jaro
de la Infano
fariĝas
Internaciaj
Jaroj
de la Infano



Vi trovos

sur la paĝoj 2 ĝis 5, ke ses personoj parolas pri kvin aspektoj de la diskriminacio. Fakte, kiam ni planis tiel ampleksan enkondukon al la kongresa ĉeftemo stokholma, ni volis eluzi roterdaman kunvenon de la sesopo (fine de novembro), por aranĝi ian grupan intervjuon pri la temo. Malfeliĉe (ĉu?), en Roterdamo samtempe okazis la kunsido de la Estraro de UEA, kaj la redaktoro devis ĉeesti ĝin, sekve li ne sukcesis trovi tempon por starigi demandojn al la intervjuotoj. Tamen, helpe de tiu nekredeble efika kvarcilindra motoro aktivula — Renato Corsetti — la sesopo intervjuis sin mem, kaj eĉ starigis al si la necesajn demandojn, kiel ekz.: "Kio okazos en Stokholmo?", "Kio nova pri la kongresa ĉeftemo?" ktp. ktp. La redaktoro poste trovis la demandojn tute subnivelaj kaj neniel Orianaj (se vi neniam aŭdis pri tiu itala ĵurnalisma tigrino, klopodu kiel eble plej baldaŭ informiĝi pri ŝi). Nun aperas tiuj respondoj, supraĵe nekoheraj, sed ĝuste tial interesvekaj kaj eĉ malkonvenciaj. La resto de la numero, bedaŭrinde, estas aranĝita laŭ ĉiuj reguloj. SIAN saluton!

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Intereso pri Esperanto animas novajn kontinentojn (Humphrey Tonkin)
- 2 Kongresa ĉeftemo por Stokholmo: Ses homoj pri kvin aspektoj de diskriminacio (Renato Corsetti, Anna Brennan, Hans Bakker kaj Uwe Joachim Moritz, Brian Moon, John C. Wells); Bela libro, kiu timigas
- 5 Traduke konkursi
- 6 Semajno de Internacia Amikeco, inter la 17a kaj 23a de februaro 1980: Ĉu iu intencas kunhelpi al belgoj? (D-ro Wim M.A. De Smet)
- 7 Esperanto-instruado: Avantaĝoj kaj kiel eluzi ilin (Zlatko Tišljar)
- 8 Leterkesto (Nervi, Kočvara, Berényi, Meiri, Majchert, Eder, Reiersøl, Gilbert, Maitzen)
- 10 Recenzoj: "Astronomia foto-atlaso" (Hans Michael Maitzen); "El la nova ĝardeno / Dal nuovo giardino; Originalaj poemoj itallingven tradukitaj el Esperanto" (Aldo de' Giorgi); "Poezia bukedo por geknaboj de la mondo" (Wouter F. Pilger); "La piratoj de Penzanco aŭ Sklavo de la devo" (Diccon Masterman); "Laŭ e...fika maniero" kaj "Nova e...fiko" (Boris G. Kolker); "Granda galerio Zamenhofa 2" (Teodor Montano); "Japana variacio" (Charles R.L. Power); "Pri Esperanta tradukarto" (Geoffrey Sutton)
- 13 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 14 TEJO-paĝo: Ĉu Japanio movadas por si mem? (Zdravka Metz); Impulso el la Sudo
- 15 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 65a Universala Kongreso de Esp.)
- 16 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 18 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio; Ekzameno E (Bernard Golden); Anoncoj
- 20 Anoncetoj

La kovrilo

Kiel kutime, ni serĉis ion gajan, esperdonan por la unua ĉi-jara kovrilo. Vidu, ni trovis! Du rajdantoj kaj du rajdatoj. Kaj oni ne scias, kiuj el ili pli feliĉas, tiuj etaj supre aŭ la plenkreskaj tie sube. Aparta kaŭzo denove kovrilbildi pri infanoj, malgraŭ la ĵusa forpaso de la Internacia Jaro de la Infano, estas la pledo de Unuiĝintaj Nacioj, ke tiu porinfana kampanjo pludaŭru, ke ne ĉio finiĝu per simpla unujara programo. Fakte, tiun "plilongigon" de diversaj jaraj kampanjoj UN jam delonge praktikas (rasa diskriminacio, virinoj). Ankaŭ niaj kampanjoj povus havi sian sekvon en pli longdaŭraj laborplanoj. Tamen, kiam temas pri la infanoj, UEA faris siajn pozitivajn decidojn jam antaŭ la plilongiga pledo de UN: ankaŭ en 1980 la Belartaj Konkursoj havos porinfanan branĉon, kaj la stokholma LKK insistas pri nepra sukcesigo de la ĉi-jara Infana Kongreseto (vidu la paĝon 15 pri tio). (Foto: Zdravko Nikolov)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo, eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) 259 8821.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Intereso pri Esperanto animas novajn kontinentojn

DUM LA JARDEKO, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la Internacia Lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj de post 1887, la lingvo alportis ĝojon kaj feliĉon al milionoj da homoj. Ĝi malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi disemis sentojn de internaciismo kaj komprenemo en mondo malpaca, ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj, kaj ĝi ebligis praktikan komunikadon inter la homoj en spirito de egaleco.

Ĝia influo etendiĝis preter la uzantojn mem. Scioj akiritaj per Esperanto penetris en la sociojn, kaj la principoj de esperantismo efikis ankaŭ ĉe tiuj, kiuj ne konas la lingvon mem. Kvankam la rivaleco inter la grandaj naciaj lingvoj ankoraŭ regas en multaj internaciaj rilatoj, Esperanto abunde montris, ke ĝi kapablas plene ludi la rolon de efika internacia lingva komunikilo.

Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo plene elprovita fariĝos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj, la diverslandaj edukaj sistemoj, kaj la ĉiam kreskanta nombro da homoj, kiuj partoprenas la internacian komunikadon. Restas la demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio. Aŭ ĉu oni preferas solvi la internacian lingvan problemon per

diskriminaciaj solvoj, favorante certajn naciojn kaj lingvojn, kaj malfavorante aliajn?

La respondo al tiu demando restas parte en la fluo de la historio; sed parte ĝi restas en la manoj de la parolantoj de Esperanto. La mondo ne venos al Esperanto kvazaŭ nature. Se tiel estus, ĝi venus al paco kvazaŭ nature, ĝi venus al malarmado kvazaŭ nature, kaj ĝi estingus homan kruelecon kaj homan mizeron kvazaŭ nature. Male, ĝi venos al Esperanto ĉar la parolantoj de tiu lingvo konscie kaj harmonie kaj sagace laboros por tiu celo, forigante la senscion kaj farante el skeptikuloj konvinkitojn. Oni ofte aŭdas, ke ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, sed vere la ĉefa malhelpo estas senscio, kaj prudentaj duboj forigeblaj per pravaj argumentoj.

Ĉu, do, la jardeko de la 1980aj jaroj estos la jardeko de Esperanto, la jardeko, en kiu oni fine konsciiĝos pri la maljusteco kaj la nenecesaj kostoj de la nuna internacia lingva reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj: ili bezonas jardekojn, eĉ cent jarojn, por maturiĝi. La Internacia Lingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin. En decembro 1979 kompletigis 25 jaroj da rekono de Esperanto flanke de Unesko: la fama rezolucio subtena al Esperanto estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco en 1954. Tiu datreveno koincidas kun nova erao en la rilatoj kun Unesko kaj UN, inaŭgurita de la vizito de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al nia kongreso en 1977 kaj nun de la malfermiĝo en Nov-Jorko de nova oficejo de UEA kies specifa celo estas fortigi la rilatojn kun UN. En la jaro nun finiĝanta la sekretario de EKOSOK vizitis nian kongreson, kaj UEA estis elektita al gvida rolo en la konstanta komitato de neregistaraj organizaĵoj ĉe Unesko.

UEA mem estas pli forta, pli harmonia kaj pli finance kaj morale stabila ol ĝi eble iam ajn estis. Niaj membroj estas lojalaj kaj sindonaj. Kaj novaj moviĝoj de intereso pri Esperanto animas kontinentojn antaŭe apenaŭ tuŝitajn de la Internacia Lingvo.

Staras preta la lingvo. Malfermiĝas al ni iom post iom la internaciaj organizaĵoj, la publika opinio. Pretas nia Asocio. Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni redediĉu nin al la laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon per la Internacia Lingvo Esperanto.

Zamenhof-Tago 1979

Humphrey Tonkin

Foto: V. Novobilská



LA ESTRARO DE UEA, LA CENTRA OFICEJO KAJ LA REDAKCIO DE LA REVUO "ESPERANTO" TRE KORE DANKAS PRO LA MULTAJ BONDEZIROJ, RICEVITAJ OKAZE DE LA JARŜANĜAJ FESTOTAGOJ, KAJ PLEJ SINCERE RECIPROKAS ILIN.

Ses homoj pri kvin aspektoj de diskriminacio

Renato Corsetti:
"Multa akvo fluis
sub la pontoj kaj
multa retoriko antaŭ
la mikrofonoj. . .
Kion ni ofertas al la
mondo, kion la
mondo postulas. . ."



KONGRESAJN TEMOJN oni inventis tre verŝajne samtempe kun kongresoj. Kiam temas pri la Universala Kongresoj, tamen, ni povas rimarki kelkajn evolu-tendencojn de Bulonjo-sur-Maró ĝis Stokholmo.

En la unuaj internaciaj Esperanto-kongresoj la kongresa temo estis memevidenta: ĝi estis pure kaj nure Esperanto, kaj oni debatis pri ĝi kaj pri la movado por ĝi. Tra la jardekoj multa akvo fluis sub la pontoj kaj multa retoriko antaŭ la mikrofonoj, kaj tiel iom post iom la fenomeno "internacia lingvo" iĝis klara kaj klarigita el ĉiuj eblaj vidpunktoj. En la lastaj jardekoj kongresaj temoj respegulas la klopodojn de la Esperanto-movado difini sin mem kaj sian lokon en la pli vasta mondo. Kaj jen aperas kongresaj temoj, kiuj pritraktas ĝeneralajn problemojn kaj estas okazo por esplori la kunligojn inter tio, kion ni ofertas al la mondo, kaj tio, kion la nuntempa mondo postulas.

Ofte temas pri demandoj aktualaj, al kiuj UN kaj Unesko dediĉas unujaran aŭ jardekan agadon. Ĉi-speca estas la stokholma kongresa temo: **Diskriminacio**.

Ĉi-foje ni, la prizorgantoj de la kongrestema pritrakto, starigis antaŭ ni la taskon minimumigi la oscedadon de la kongresanoj. Vi scias ke kutime ekzistas granda fendo inter prelegantoj kaj "prelegatoj". Prelegantoj volas detale analizi fenomenojn kaj science pravigi siajn konkludojn. Kiam ili prelegas, ili efektive celas siajn fakajn kolegojn kaj ne la ĉeestantan publikon. Prelegatoj volas simple akiri informojn en kiel eble plej "komforta" maniero kaj rilatigi tiujn informojn al sia persona sperto. En Stokholmo ni antaŭvidas kelkajn bazajn prelegojn kaj multan, tre multan, debata-don en malgrandaj rondoj. Ni esperas ke kongresanoj en malgrandaj rondoj kuraĝos pli trankvile paroli kaj,

do, aktive kontribui. Cetere, detaloj pri prelegoj, laborgrupoj, kaj ĉiuj aliaj kongrestemaj eroj aperos kaj en ĉi tiu revuo kaj en la Kongresa Libro kaj en aliaj revuoj. Menciindas, ke jam antaŭ la Kongreso homoj, kiuj montros intereson, ricevos bazan materialon, kiun ili povos trastudi en sia hejma fotelo. Mi kaptas la okazon por aparte insisti pri tio, ke ni ne diskriminacios komencantojn. Konversaciaj rondoj pri la kongresa temo donos eblecon konigi sian vidpunkton ankaŭ al akuza-tiv-mankaj italoj kaj eĉ al vokal-murdantaj angloj.

Ĉu eblas ne diskriminacii inter diskriminacioj? Al kiuj diskriminaciformoj ni donos ĉefan atenton? Ni klopodas fari nian maksimuman eblon, por enplekti ĉion enplekteblan en la tempaj kaj spacaj limoj de la Universala Kongreso. Rasa-etna, kontraŭvirina kaj ekonomia diskriminacioj estos pritraktataj en apartaj laborgrupoj; lingva diskriminacio ricevos apartajn prelegojn kaj estos saŭco de la tuto. Krome diskriminacioj kontraŭ handikapuloj, religiuloj, ktp. trovos sian lokon en apartaj fakkunvenaj debatoj kaj en ISU-prelegoj.

Bela libro, kiu timigas

HIROSIMA-NAGASAKI
Bilda Dokumenta pri la Atombombado

ASPEKTE — tio ĉi estas la plej bela librovolumo iam eldonita en la Internacia Lingvo; enhave — tio ĉi estas la plej horora kaj harstariga verko iam aperinta en Esperanto. Ĉefe per fotoj kaj pentrobildaj reproduktaĵoj, sur 344 grandformataj paĝoj, sesdeko da aŭtoroj kaj kunlaborantoj kreas plenan portreton de la atombomba infero de antaŭ 35 jaroj. Feliĉe, la fotoj estas nigra-blankaj, alie oni ne eltenus eĉ foliumi la libron, kies eldonon ebligis miloj kaj miloj da ordinaraj civitanoj, kaj ne iu riĉa entrepreno aŭ ŝtata instanco. La Esperanta eldono aperis en la kvanto de 1500 ekzempleroj, baldaŭ post la anglalingva versio (3 000 ekz.), kaj samtempe kun la hispana (nur 500 ekz.), antaŭ la franca eldono de la volumo. Tio iom sugestas la gravecon, kiun la Eldon-Komitato por Hirosima-Nagasaki atribuas al la Internacia Lingvo kaj ĝia rolo en la hodiaŭa (kaj morgaŭa) mondo.

Kial ĉi tiu libro en Esperanto? La respondon ni trovas en "Antaŭparole", komence de la volumo: "Tiu ĉi li-



Anna Brennan:
"Diskriminacio
kontraŭ virinoj
havas multajn kom-
munajn aspektojn
kun aliaj formoj
de diskriminacio".

ESTAS des pli malfacile kontraŭbatali diskriminacion kontraŭ virinoj, ĉar ĝi ofte okazas nekonscie. Oni povus argumenti — kaj tiu argumento ja ofte estas aŭdata — ke ne ekzistas tia diskriminacio en la Esperanto-movado. Neniu kutime malhelpas, simple pro ŝia sekso, ke kapabla virino fariĝu prezidanto de landa asocio aŭ membro de la Komitato. Diskriminacio je tiu nivelo ne estas nia problemo. La problemo fakte havas multe pli profundajn radikojn. Ni rekonas ĝin ĉe virino, kiu en loka kunveno ĉiam rolas partoprenanton, neniam gvidanton. Aŭ, kiu dum jaroj diligente kaj akurate plenumas la rutinajn devojn de kluba sekretario aŭ kasisto, sed neniam pensas mem iniciati novan agadon aŭ paŝi antaŭ mikrofonaĵon por instigi aliajn. Por ne mencii la perditajn esperantistinojn, kiuj entute ne ĉeestas Esperanto-kunvenojn, ĉar ili devas resti hejme por prizorgi infanojn aŭ eĉ simple ĉar la edzo ne interesiĝas. Tiaj virinoj montras la efikojn de sub-

tila formo de diskriminacio, kiu komenciĝis eĉ antaŭ ol ili lernis la gepatran lingvon kaj kiu manifestiĝas en ĉiu aspekto de la vivo.

Ekzemploj de diskriminacio kontraŭ virinoj abundas en la socio ekster la Esperanto-movado: la virino, kiu perdas sian postenon dum laborkrizo, ĉar ŝi "malpli bezonas ĝin" ol viro; tiu, kiu iras hejmen post plena tago da laboro por komenci sian duan labortagon; tiu, kiu restas konstante en malalta, senrespondeca posteno sen espero progresi, kontraŭ salajro eĉ ne konsiderebla de viro. Sed por trovi la plej ekstremajn formojn de diskriminacio, ni devas iri al aliaj socioj, kie ekzemple knabino povas ricevi malpli por manĝi ol ŝia frato.

Diskriminacio kontraŭ virinoj havas multajn komunajn aspektojn kun aliaj formoj de diskriminacio, laŭ kiuj la traktado de homo fare de aliuloj dependas de eksteraj trajtoj, kiel haŭtkoloro aŭ deveno, anstataŭ de personaj kapabloj. La rezulto kaŭzas malutilon al la tuta socio, pro la nekredebla malŝparo de neevoluita potencialo. Sed ofte batalantoj kontraŭ aliaj formoj de diskriminacio (kutime mem viroj) emas ignori la fakton, ke 50% el la grupo, por kiu ili luktas, ankoraŭ ne sukcesos praktike ĝui la rajtojn (ekz. je pli bona eduko aŭ pli altaj laborpostenoj), kiujn ili gajnos nur en la teorio.

Interesatoj (de ambaŭ seksoj) havos eblecon konsideri ĉi tiujn demandojn dum la Kongreso en serio de diskutgrupoj. La celo estos identigi la radikojn de diskriminacio kontraŭ virinoj, kaj kompari tiun formon de diskriminacio kun aliaj (precipe kun lingva diskriminacio). Tiucele la grupoj unue ekzamenos la situacion de virinoj en diversaj mondpartoj, pritraktos diskrimina-

bro ne nur koncernas la foran estontecon: la nukleaj arsenaloj hodiaŭ tenas dekmilojn da bomboj, el kiuj ĉiu estas supermezure pli detruiva ol tiuj uzitaj en Hi-




La kovrila bildo
de la libro, kiu
heroldas la ekster-
majn trajtojn de
la atomenergio

rosima kaj Nagasaki. Kiel ajn absurda tio ŝajnas, ni nun staras antaŭ la danĝerega realo, ke tiuj nukleaj arsenaloj kapablas ekstermi la tutan homaron multajn kaj multajn fojojn ripete. Estas nun urĝe necese, ke ĉiuj popoloj de la mondo levu publikan opinion kaj ekstaru por amasa kontraŭago. Nenie sur la terglobo devas ripetiĝi Hiroshima kaj Nagasaki."

UEA ricevis 250 ekzemplerojn de la libro. Ĝi ne estas por vendo. Ĝi estas por senpaga distribuo, unuavice, al Esperanto-kluboj kaj bibliotekoj, nur poste al unuopuloj. Necesas antaŭpagi la ekspedokostojn al unu el la kontoj de UEA (vidu sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu revuo aŭ en la Jarlibro 1979, p. 21). Bonvolu afable kompreni, ke ne eblas sendi la libron al ĉiuj, kiuj dezirus ricevi ĝin. Mendu la libron, antaŭpagu (se vi ne havas konton ĉe UEA) la **ekspedokostojn de 12,00 guldenoj**. Ni aŭ sendos al la mendintoj la libron aŭ resendos la monon, kio signifos, ke la disponebla stoko elĉerpiĝis. La ricevantoj de la libro estas afable petataj komuniki siajn komentojn pri la volumo al jena adreso: Esperantista Societo por Hiroshima-Nagasaki, ĉe Japana Esperanto-Instituto, Waseda-tyō 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio, 162 Japanio.

cion kontraŭ virinoj en lingvo kaj komunikado kaj rigardos la situacion en la Esperanto-movado. Tiuj diskutoj formas la bazon por posta, pli ĝenerala, aliro al la temo: el kio fontas diskriminacio entute, kaj kiel ĝi efikas je siaj viktimoj?



Hans Bakker kaj Uwe Joachim Moritz: "Ĉu Esperanto povas havi sian funkcion de neŭtrala interkomprenilo ankaŭ inter 'nacioj' loĝantaj en sama ŝtato?"

KIAL rasa-etna diskriminacio kaj ne **rasa kaj etna diskriminacioj**? La afero ne estas tre klara ankaŭ al ni mem. Espereble post Stokholmo ni havos pli klarajn ideojn pri la limoj inter raso kaj etno, kaj ni scios, ekzemple, ĉu ciganoj estas aparta raso aŭ aparta etno. Ĉiukaze homoj apartenantaj al aliaj rasoj kaj al aliaj etnoj estas same diskriminacitaj, kiam ili kunvivas kun homoj apartenantaj al pli fortaj rasaj-etnaj grupoj. Cetere, ankaŭ pri la nocio **etno** regas granda opinimal-sameco. Ĉu **etno**, kiun ni same uzas en la signifo de **nacio**, konsistas el komuna lingvo kaj/aŭ el komuna ekonomia vivo kaj/aŭ tiel plu? Pluraj studentoj de la problemo donis malsamajn interpretojn de la realo kaj pluraj politikistoj utiligis tiujn interpretojn en malsamaj manieroj laŭ la momentaj bezonoj. Se vi aldonas, ke historiaj hazardoj sukcesis krei tre komplikajn situaciojn (pensu nur pri serblingvaj islamanoj en Jugoslavio), vi komprenas la teoriajn kaj praktikajn malfacilaĵojn ĉi-kampe.

Pluraj esperantistoj sin demandas ĉu ekzistas rilatoj inter la klopodoj por la Internacia Lingvo kaj la klopodoj por lokaj lingvoj. Unuavide tiuj klopodoj iras tute malajn vojojn. Ni scias, ke en la Esperanto-movado oni rigardas kun miksitaj sentoj al la tiel nomataj "etnistoj". Sed tio fontas, laŭ ni, el tuta aro da miskomprenoj.


Unuavice, la neŭtraleco estis komprenita kiel malpermeso okupiĝi ankaŭ pri lingvaj problemoj, kiuj ligiĝas kun politikaj problemoj. Kompreneble lingvaj problemoj de etnaj malplimultoj ligiĝas kun politikaj problemoj, sed same ĉiuj problemoj pri diskriminacio ligiĝas kun politiko, kaj fine: ĉu ekzistas io en la mondo, krom la vetero, kio ne ligiĝas kun la politiko en ties plej vasta senco?

Duavice, ni, kiel esperantistoj, batalas por justeco en internaciaj lingvaj-kulturaj rilatoj. Esperanto estas ĝuste la neŭtrala ilo por tiu justeco. Por multaj esperantistoj, tamen, **nacio** kaj **ŝtato** estas precize la sama afero, do, por ili internacia lingvo estas sinonimo de interŝtata lingvo. Dum ĉiuj esperantistoj kapablas vidi la diskriminacion kiam ĝi okazas inter ŝtatoj, ekzemple fare de la angla lingvo en Svedio, ili ofte ne rekonas la saman diskriminacion kiam ĝi okazas en la limoj de unu ŝtato, ekzemple fare de la sveda lingvo en laponaj loĝlokoj.

Ĉu Esperanto povas havi sian funkcion de neŭtrala interkomprenilo ankaŭ inter "nacioj" loĝantaj en sama ŝtato? De tempo al tempo iuj asertis tion kaj aliaj iuj asertis la malon. Ni asertas nenion pri tio. Ni simple deziras ke la Esperanto-movado demandu sin pri ĉi tiu fenomeno kaj alprenu strategian gvidlinion pri ĝi. Stokholmo estos okazo ankaŭ por tio.

EKONOMIA diskriminacio estas esprimo malfacile akordigebla kun la aliaj "klasikaj" formoj de diskriminacio (lingvo, raso, religio, politika opinio, sekso ktp), kiuj ja rilatas al senigo de bazaj rajtoj, surbaze de ies grupa aparteno, senkonsidere pri ties individueco. Alivorte, se homo suferas ekonomian maljustecon, tio ne nepre estas diskriminacio. Ekzemple, se homo maldungiĝas, tio plej ofte estas ja malfeliĉo, sed en relative malmultaj kazoj oni parolus pri diskriminacio.

Aliflanke, estas evidente, ke ekzistas en la mondo tuta aro da ekonomiaj rilatoj kaj situacioj, kiuj estas malegalaj, maljustaj aŭ kiuj malpermesas al homoj plene ĝui siajn bazajn rajtojn. Tiu kiu malsatmortas aŭ ekzistetas per vivminimumo en la Tria Mondo ne havas la samajn eblecojn pri siaj homaj rajtoj kiel homo, kiu manĝas trifoje tage kaj povas pagi al si vojaĝojn kaj aliajn luksojn. Povas esti, ke la simileco inter la mondperceptoj de bonstatulo kaj de diskriminaciata minoritato estas pli granda ol oni eble supozas pro, ekzemple, simila psikologia bazo. Alia aspekto estas komprene-



Brian Moon:
"Ĉu oni povas bone uzi la vorton **diskriminacio** kiam temas pri internaciaj rilatoj, ŝajnas al mi problema demando."

ble la komunaj trajtoj inter ekonomiaj rilatoj kaj aliaj formoj de diskriminacio t.e. la ekonomia esprimiĝo de diskriminaciaj rilatoj (dungebleco, laborkondiĉoj, sociaj servoj). Oni povas paroli ankaŭ pri la iom arbitra grupigo de homoj surbaze de ilia soci-ekonomia pozi-

cio: ciganoj, ekzemple, kiujn oni diversmaniere diskriminacias, sed enmiksiĝas en tio aliaj aferoj, ne nur rasa diskriminacio. Ekzistas aliaj homoj, simile vivantaj kiel ciganoj, en similaj ekonomiaj kondiĉoj, kiujn oni tute same malbone traktas en la socio.

Ĉu oni povas bone uzi la vorton diskriminacio kiam temas pri internaciaj rilatoj, ŝajnas al mi problema demando. Certe, diversaj aspektoj de interŝtataj rilatoj, ankaŭ ekonomiaj, kreas aŭ plifortigas diskriminaciajn situaciojn, sed, por mi, estas diferenco inter diskriminacio kaj simpla senavantaĝigo aŭ malavantaĝigo. Iusence, la celo en la t.n. nord-suda dialogo estas krei pli grandan ekonomian justecon per speco de "inversa diskriminacio"... Aŭ ĉu? Jen tuta temo aŭ temaro por diskuto.



John C. Wells:
"Lingva egalrajteco ne estas atingebla sen apliko de la Internacia Lingvo Esperanto".

MI PREZENTOS la kongresan temon, Diskriminacio, per enkonduka ĝenerala prelego — panorama prelego — en la kadro de la Malfermo. Krome, mi faros ISU-prelegon pri lingva diskriminacio kaj mi partoprenos en la laborgrupo pri rasa kaj etna diskriminacio (subbranĉo: rasa).

Diskriminacio estas sisteme maljusta konduto kontraŭ difinita grupo interne de iu socio, aŭ difinita parto de la homaro. Ĝi estas atenco kontraŭ la homaj rajtoj de la diskriminaciata ('viktima') grupo. Ĝiaj radikoj kredeble troviĝas esence en la psikologio de la forta individuo en rilato al la malforta. La fortulo povas pravigi sian maljustan agon — pravigi ĝin al si mem, al sia konscienco — nur se li perceptas la diskriminaciaton kiel ne indan ĝui egalajn rajtojn. Tiel li (notu jam la seksan diskriminacion!) emas karakterizi la diskriminaciaton kiel nefidindan, neseriozan, mallaborem, nekapablan, neinteligentan, malvirtan ktp. En multaj kazoj la diskriminaciato eĉ mem adoptas tiun opinion pri si (la fenomeno 'memsubpremo').

Inter la branĉoj, kiujn diskutas la laborgrupoj en UK, estas rasa kaj etna, kontraŭvirina, internacia-ekonomia (Nordo—Sudo), kontraŭhandikapula. Ekzistas multaj aliaj specoj: oni pensu nur pri diskriminacio kontraŭ pliaĝuloj, pri religia diskriminacio, pri politika diskriminacio, pri diskriminacio surbaze de seksa orientiĝo, kaj multaj aliaj.

Lingva diskriminacio estas temo pri kiu ni jam multe diskutis. Necesas tamen daŭre teni ĝin antaŭ la okuloj de la publiko. Lingva egalrajteco ne estas atingebla sen apliko de la Internacia Lingvo Esperanto; ĝi estas nepre atencata per klopodoj ĝeneraligi la uzon de la angla aŭ alia nacia lingvo en internaciaj rilatoj.

Rasa diskriminacio estas la maljusta pritrakto de rasa grupo. Inter la konataj 'viktimaĵ' grupoj troviĝas nigroloj, brunhaŭtuloj, judoj, praindiĝenoj, ciganoj ktp., laŭ la lando. Lastatempe aldoniĝis la diskriminacio kontraŭ 'gastlaboristoj' en Eŭropo. Kvankam multaj landoj faris grandajn fortostreĉojn por forigi la rasan diskriminacion en internacia kaj enlanda kadroj, tamen neniu povus pretendi, ke la batalo kontraŭ rasa diskriminacio estas jam venkita.

La branĉoj interligiĝas. Kaj ĉiu havas lingvan flankon.

Traduke konkursi

DE POST LA FORIGO, antaŭ pluraj jaroj, de la tradukaj branĉoj de la Belartaj Konkursoj, okazadas iom sporade tradukkonkursoj laŭlingvaj, tiel ke jen Londona Esperanto-Klubo kaj ELNA kunlaboris por anglalingva konkurso, jen la itala konkurso "Larius" starigis branĉon por tradukoj el la itala al Esperanto. Ankaŭ ĉi-jare anonciĝis jam tri tiaj konkursoj:

Franclingva: Prozajn tradukaĵojn, prefere de longo 700- ĝis 1 000-vorta, oni proponu ĝis la 31a de marto al la sekretario de Franclingva Tradukkonkurso 80: s-ino Claude Nourmont-Moon, 3 rue de Kleppchen, Dalheim, Luksemburgo. Ĉi tiu aranĝo okazas sub la egido de Unuiĝo Franca por Esperanto.

Germanlingva: Germana Esperanto-Instituto ĉi-jare debutigas sian konkurson, pri kiu detalojn provizos la

organizanto: s-ro Klaus Schubert, Eckernförderstr. 40, D-2300 Kiel 1, FR Germanio.

Nederlandlingva: Jam la trian jaron, flandroj kaj nederlandanoj havos eblecon montri siajn traduktalentojn en konkurso organizita de Nederlanda Esperanto-Asocio kaj Belga Esperanto-Federacio. Detalan regularon de la konkurso, kiu havas kaj prozan kaj poezian branĉojn, oni petu de la sekretario: f-ino A.J. Middelkoop, Jonkerweg 11, 1217 PL Hilversum, Nederlando. Konkursa limdato estas la 1-a de marto 1980.

Ĉiuj ĉi entreprenoj estas laŭdindaj — sed, ĉu ili vere sufiĉas? Ŝajne, ne ekzistas facila solvo por esperantistoj el lingvokomunumoj malmulte reprezentitaj en la Movado. Sed almenaŭ devus stariĝi kelkaj pliaj: reviviĝu la anglalingva, naskiĝu hispanlingva, japanlingva, ruslingva . . . Sen tio ni ja riskas, ke niaj potencialaj Kabe-oj . . . kabeigis.

Ĉu iu intencas kunhelpi al belgoj?

EN LA "KALENDARO" (novembra numero de la revuo, p. 190) troviĝas: "Februaro 17–23: Semajno de Internacia Amikeco", sub foto de kvar konversaciantoj diverslandaj. Simila atentigo aperas jam de pluraj jaroj. Ĝi memorigas, ke tiu semajno estas bona okazo por konigi la Internacian Lingvon pere de la ideoj pri internacia amikeco. Sed kiom da Esperanto-asocioj, kiom da lokaj Esperanto-grupoj, kiom da individuaj esperantistoj kaptas tiun unikan okazon por konigi sin al la ekstermovada mondo? Ŝajne nur malmultaj, se oni juĝas laŭ la informoj en la Esperanto-gazetaro. Ŝajne multaj preferas ĝemi kaj ĉikani pri la indiferento, anstataŭ organizi ion kio povus trarompi ĝin.

La ideo okazigi ĉiujare Semajnon de Internacia Amikeco fine de februaro estis lanĉita en 1968 de Eric Carlén, tiam vicprezidanto de UEA. En februaro, tiutempe, en pluraj lokoj tra la mondo okazis iniciatoj, kelkaj eĉ tre originalaj, per kiuj Esperanto-grupoj kaj individuoj manifestis la internacian amikecon. Sed, malgraŭ pluraj bonaj iniciatoj, kiuj jen kaj jen estis entreprenataj ankaŭ en la sekvaj jaroj, la ideo ekvelkis kaj komencis droni en pasivecon, kiu karakterizas multajn flankojn de la Movado.



Nur kelkaj manifestadoj postrestas, eĉ kelkfoje bone prosperas, sed ili kvazaŭ hontas konigi apartenon al internacia kampanjo, kiu tra la mondo proklamas la internacian amikecon. Tamen, tiuj kelkaj postvivantoj povus esti la ĝermoj de vere tutmonda kampanjo, se nur la lokaj grupoj, naciaj kaj fakaj Esperanto-asocioj kaj ĉiu movada fervorulo – prefere kun organizaĵoj ekster la Movado – volus fari kelkajn minimumajn agojn. Tio aparte bonvenus nun, kiam la Komisiono pri Kulturo de UEA rekomendis, ke la Asocio forte subtenu kaj propagandu ĉiajn iniciatojn tiurilate.

Tuj multaj diros, ke ilia grupo estas tro malforta, ke ili ne havas la necesajn rilatojn, ke la tempo mankas ktp. Sed, ĉu tiuj ne estas la kutimaj senkulpigoj pro manko de serioza pripensado de eblecoj? Ĉiu inter ni povas dum tiu semajno kun bondeziroj serĉi pli amikecan kontakton kun eksterlandanoj en sia medio. Ĉiu loka grupo povas fari la samon pli grandskale, organizi diskuton aŭ prelegon pri internacia amikeco en rilato kun Esperanto. Depende de la lokaj cirkonstancoj, de la rilatoj kun gazetoj, aŭtoritatoj aŭ medioj de eksterlandanoj, kaj de la iniciatemo de kelkaj membroj, oni eĉ povas fari multe pli. La naciaj kaj fakaj asocioj povas minimume stimuli siajn grupojn, sed eble ankaŭ mem iniciati ion. Eĉ se oni komencas malgrandskale, oni povas konstrui jaron post jaro kaj atingi multon poste.

Kiel ekzemplon, mi diru kio okazis en mia vilaĝo, Kalmthout en Belgio, kie ni en 1980 jam la dekan fojon faros ion. Post sukcesa festo en Antverpeno en 1970, mi en 1971 konvinkis la lokan pastron, ke en

meso dum la Semajno la prediko temu pri internacia amikeco kaj ke la ĥoro kantu ĉi-rilate en diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. La afero bone sukcesis kaj eĉ vekis la atenton de la flandra televido, kiu venis filmi kaj elsendis tiujn Esperanto-kantojn. La poste starigita loka Esperanto-grupo transprenis en 1972 la iniciaton kaj aldonis al la programo vesperon de popoldancoj, kiu diversforme restis ĝis nun. En 1973 aldoniĝis al tio la "internacia promenado", kiun ni ŝuldas al la fakto ke nia vilaĝo situas apud la nederlanda landlimo kaj havas belajn pejzaĝojn. Ĉiujare ni nun faras tiun promenadon trans la landlimojn, kelkfoje eĉ kun 200 partoprenantoj. Regule, ni estas afable akceptataj de la koncernaj komunumestroj. Ekde 1974 la tago estas organizata de speciala komitato, konsistanta parte el personoj ekster la Movado. En 1975 estiĝis nova iniciato: elekto, el la tuta Benelukso (Belgio, Nederlando, Luksemburgo), de "ambasadoro kaj ambasadorino de la internacia amikeco". Por tiu konkurso ĉiujare pluraj gejunuloj sin prezentas kaj ĉiujare pli granda nombro da premioj alfluas. En 1977 aperis broŝuro kun la programo de la tago, kun informoj pri internacia amikeco kaj Esperanto, kun reklamoj de firmaoj. En 1978 la Ministerio pri Nederlandlingva Kulturo en Belgio decidis aŭspicii la tutan aranĝon. La afero nun iom stabiligas kaj la Tago de Internacia Amikeco en Kalmthout (en 1980 je sabato, la 23a de februaro) iĝis ne nur renkontiĝo de multaj esperantistoj el Belgio kaj Nederlando (kaj eĉ el Francio kaj Germanio), sed ankaŭ festo al kiu la loĝantaro de la komunumo Kalmthout kaj de ĉirkaŭaj komunumoj partoprenas.

Dank'al iniciatemo kaj persistado dum dek jaroj, kreskis granda festo, kiu informas la lokan loĝantaron pri internacieco kaj pri Esperanto. Feliĉe nun ankaŭ en Antverpeno okazas sukcesa kultura vespero (aŭspiciata kaj subvenciata de la ministerio), kiu antaŭas nian feston kaj iasence komplementas ĝin. Ankaŭ aliaj iniciatoj iam ligiĝis al ĝi.



KUN BONDEZIROJ okaze de la Semajno de Internacia Amikeco

Kun tia teksto kaj la apudaj desegnaĵoj aperis, unuafoje en Esperanto, gratulkartoj de UNICEF. Dek kartoj (minimuma mendokvanto), kun kovertoj) kostas 11,00 gld. La profito iras al UNICEF. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Sed unu granda demando turmentas min: kial ni en Benelukso estas kvazaŭ la solaj, kiuj entreprenas ion? Konsentite, nia situo apud la landlimo estas aparte favora. Sed tio ne povas esti la klarigo. Se tiom da aliaj grupoj estus same konstruintaj tradicion de dek jaroj, la Semajno de Internacia Amikeco nun estus tutmonda kampanjo, pri kiu la Esperanto-movado povus fieri kaj per kiu ĝi povus argumenti.

Ni esperu, ke 1980 montriĝos esti la turnopunkto en tia sinteno. Jam estas kelkaj bonaj aŭguroj: la Flandra Esperanto-Ligo insistis ĉe ĉiuj aliaj grupoj, ke ili entre-

prenu ion kaj almenaŭ sendu kelkajn partoprenantojn al la festo en Kalmthout. Ĉu multaj vekiĝos kaj komprenos, keili jaron post jaro preterlasas bonan okazon por konigi Esperanton al la aliaj pere de la Semajno de Internacia Amikeco? La jaro 1980 devos doni la respondon. Nur, se multaj raportoj pri entreprenitaĵoj tiurilataj atingos la Centran Oficejon de UEA aŭ la Komisiiton pri la Semajno (s-ro E. Carlén, Yxhult, S-69202 Kumla 2, Svedio), oni povos konkludi, ke valoras daŭrigi la iniciaton.

D-ro Wim M.A. De Smet

ESPERANTO-INSTRUADO:

Avantaĝoj kaj kiel eluzi ilin

NI ĈIUJ scias, ke Esperanto estas simpla kaj pluroble pli facila ol aliaj lingvoj. Sed kial ni ne sukcesas praktike tion montri? Kial ekzistas nur relative malmultaj homoj, kiuj bone ĝin regas, kaj kial niaj kursoj finiĝas kun magraj rezultoj? Kial, finfine, la esploroj de Szerdahelyi kaj Frank diras, ke ĝi estas nur 20 aŭ 30 procentojn pli facila ol aliaj lingvoj? Ni ne povas kredi tion, ni scias ke la vero ne estas tia, sed kial ne eblas tion pruvi?

En Zagrebo (Jugoslavio) Studenta Esperanto-Klubo kaj Internacia Kultura Servo (IKS) dum la lastaj 10 jaroj okazigas ĉiujare 20–40 kursojn por ĉiuj aĝoj. La rezultoj principe estis malkontentigaj. Ĉiusezone anonciĝas nur en elementaj lernejoj 300 – 400 infanoj. En la sekva lernojaro restas nur kelkdeko por daŭrigi en la dua ŝtupo. El centoj da plenkreskuloj jare restas fine de la kurso 10 – 20. La plejmulto fuĝas jam dum la kurso, tiel ke la finon atingas kaj venas al la ekzameno

10 – 40% de la komencintoj. Ankaŭ tiam, dum la ekzameno, prezentiĝas vere malsufiĉaj scioj, ĉefe malkapablo paroli, mem krei frazojn.

Kial la konataj avantaĝoj de Esperanto ne estas efektivegeblaj en la praktiko? Ekzistas nur du respondoj: Esperanto ne estas simpla kaj facila kiel ni kredas; la uzataj instrumentoj estas malĝustaj. Antaŭ kvar jaroj en IKS ni decidis eksperimenti. Ni rimarkis ĉe la elementlernejaj infanoj relativan progreson en la unua lernojaro, sed en la postaj eĉ regreson (ne nur stagnon). La problemon ne sukcesis venki eĉ la plej kapablaj instruistoj. Ni supozis, ke la ĉefa kaŭzo estas tro longa tempo inter unuopaj instruhoroj, tiel ke la infanoj – ne lernante hejme – pli multe forgesas, ol ili lernas dum la horo. Nature, la malprogreso ilin ĝenas, kaj ili forlasas niajn vicojn. Ni elektis grupon, kiu en la unua jaro komencis per 24 infanoj, kaj nun estis en la dua jaro. Restis dek infanoj 13-jaraj. Anstataŭ daŭrigi tradicie dum 2 horoj semajne, ni intensigis la kurson: dum du semajnoj po unu horo tage. En tiu periodo la kursgvidanto tute ne instruis novajn sciojn sed zorgis nur pri konversaciaj ekzercoj. En ĉiu horo ĉiu infano havis 4 minutojn por rakonti historieton aŭ paroli pri donita temo. La instruisto nombris la frazojn uzitajn dum la 4 minutoj, kaj la plej parolemaj estis premiitaj. Post la du semajnoj la infanoj kapablis paroli memstare. Poste oni daŭrigis per normala kurso dufoje semajne. Ĉiuj dek infanoj restis en la Movado; ok el ili partoprenis ĝis nun unu aŭ plurajn fojojn en TEJO-kongreso, kaj kelkaj gvidas mem kursojn.

Montriĝis intertempe, ke la uzataj lerniloj (en elementaj lernejoj: *Esperanto I* de Szerdahelyi) estas tro ampleksaj kaj tempoperdaj, ĉar por ellerni la kompletan Esperantan strukturon necesas pluraj jaroj, kaj la homoj estas tro senpaciencaj por tiom atendi. Ŝajnas, ke la plejmulto de la aŭtoroj kopiis la metodojn de aliaj fremdaj lingvoj: lerni malrapide la gramatikon kaj multajn vortojn! Tial Kroatia Esperanto-Ligo formis en 1978 novan lernejan komisionon kaj, konsiderinte ĉiujn tiujn spertojn, ĝi ellaboris bazan lernilon por



Lingvolaboratoria kurso de Esperanto: Ĉu ni prave imitas la instrumentojn intencitajn por aliaj lingvoj?

novspecaj Esperanto-kursoj. La celo de la reformo: **dum minimuma tempo atingi parolkapablon**. La malnova programo por A-kurso postulis: scii la tutan gramatikon kaj mil radikojn. La nova postulas: scii tion da gramatiko kaj tion da radikoj, kiom sufiĉas por efektiviĝi ĉiutagan simplan konversacion, sed povu tion **praktike bone uzi**. La komisiono laboris duonjaron, esploris la plej modernajn konojn de teorio pri informoj kaj tiujn pri Esperanto, kaj konstatis, ke por la starigita celo sufiĉas koni la gramatikon sen partipoj kaj duonon de ne tro ofte uzataj afiksoj. Krome, oni ne bezonas pli ol 350 Esperantajn radikojn por krei pli ol 2000 vortojn, kio prezentas ĉirkaŭ 80% de la tuta lingva materialo uzata.

Tiel minimumigita lernmaterialo ebligas ŝpari tri kvaronojn de la kursotempo, kiun oni nun povas uzi nur por parolaj ekzercoj. Krome, eblas la kurson ankaŭ mallongigi! Tio estas gravega en la tempo kiam ĉiuj urgas kaj ne povas elspezi multe da tempo por lerni ion praktike nemulte utilan. La nova materialo estis tuj eksperimente aplikata, fine de 1978, en okmembra grupo (1 inĝeniero, 1 oficistino, 3 studentoj, 2 mezlernejanoj kaj 1 elementlernejano). La kurso okazis ĉiutage dum du semajnoj — du horojn tage — entute 22 lernohoroj. Okazis tuj poste ekzameno, kiu montris,

ke la ekspreslernantoj kapablis paroli duoble pli bone en Esperanto, ol kursanoj kiuj sekvis tradicion 4-monatan kurson (dufoje 2 horoj en semajno).

La komisiono finprilaboris sian projekton kaj atingis plian gravan konstaton: por ebligi la kursgvidadon al homoj kiuj mem ne estas bonegaj lingvokonantoj, necesas disdividi la lernolibron en du partojn: unu por la lernantoj, kaj alia por la kursgvidantoj (kun detalaj indikoj kion fari dum la kurso). La kvinmembra pedagogia grupo ellaboris la du librojn. En la libro por instruistoj estas detalaj informoj pri ĉiu minuto de la 10-leciona kurso. Estas ene ĉiuj eblaj demando-frazoj, tiel ke la instruisto ne devu perdi tempon elpensante la ekzemplofrazojn, kaj indikoj pri aliaj agoj dum la instruhoroj. La lernolibro por lernantoj enhavas lecionojn kaj ekzercaron necesajn en la instruhoroj, kaj kiel hejmtaska materialo kun mallonga trarigardo de la lernitaj gramatiko kaj vortaro.

Laste, en novembro 1979, okazis la plej kuraĝa eksperimento. La saman materialon kursgvidanto instruis al 3 studentinoj dum 3 tagoj (vendredon, sabaton kaj dimanĉon). Ili ellernis la tutan materialon planitan por 15 horoj (ĉiutage po 5 horoj) dum 10 horoj! La scio estis absolute kontentiga kaj la parolkapablo preskaŭ la sama kiel ĉe tiuj kiuj lernis du

Mi ne estas marksano

Mi dankas Probal Daŝgupto pro lia enpenetra recenzo de *La turoj de l' ĉefurbo*. Mi volas nur aldoni, ke la epiteto "marksano" ne kongruas kun mia idearo, kvankam mi emas agnoski la pozitivajn atingojn kaj la historian rolon de la marksismaj teorioj. Mi diras tion por evitigi miskomprenojn al eventualaj legontoj, kaj por korekti disonancon en cetera plej trafa kaj interesa kunteksto.

Mauro Nervi, Italio

Pledo pri prospektoj

En la marta numero de la revuo (p. 56) oni konstatas, ke "iam estis grava novaĵo ĉiu turisma prospekto, kiu aperis en Esperanto. Nun fariĝis malfacile eĉ menci ĉiujn el ili." Tamen, mi pledas por regula informado pri la novaperintaj prospektoj. Certe mi ne estas la sola, kiu volas ĉiun novan prospekton havi. Ne nur pro la kolektemo, sed por celoj praktikaj: ili bone servas al vojaĝplanoj, publika informado pri fremdaj landoj, kaj ankaŭ kompletigas Esperantajn bibliotekojn.

Inĝ. Vlastimil Kočvara, Ĉeĥosl.

Defende al Molnár

Leginte la recenzon pri *La knaboj de Paŭlo-strato* (en la julia/aŭg. n-ro), por la hungaraj legantoj tuj evidentas, ke W. Krikke ne konas la hungaran vivsituation komence de nia jarcento. Pro tio li tute miskomprenas la romanon. La temo ne estas "infana milito inter du

grupoj de knaboj", kiel s-ro Krikke skribas. La antaŭparolo por la traduko klarigas la simbolan signifon de la verko. La batalo pludaŭras ne nur por la "grundo", sed por iu komuna valoraĵo, kies simbolo iĝas la "grundo".

D-rino Zsuzsanna Berényi, Hungario

Mi ne konas la Esperantan tradukon, sed jes la libron pere de la hebrea traduko. Mi jam ne estas knabo, sed mi ankoraŭ ŝatas la libron kaj opinias, ke ĝi ne estas malinteresa kaj taŭga nur por knaboj.

Jinon Meiri, Israelo

Ili perdu tempon, ni ne perdu paĝojn

Ne gravas, ke iuj homoj perdas la tempon por studi volapük, sed ni ne rajtas dediĉadi al ili valorajn paĝojn de nia revuo. Ĝis nun estis alie: Inter la specimenaj demandoj por la Internacia Ekzameno ni vidas — historio de volapük, Ido, interlingua, basic english; pri volapük *Esperanto* skribis en la januara kaj julia/aŭgusta numeroj ĉi-jaraj. En tiu lasta numero — mi viŝis la okulojn pro miro — ni legas: "volapük ... ne restis en la kabineto de sia kreinto, sed estis sukcese uzata internaciskale por komunikado trans lingvajn barilojn".

W. Majchert, Pollando

Ni ne kaŝas niajn librojn

La nova Esperanto-grupo en Herrenberg realigas, laŭ mia opinio, rekomendindan varban ideon: Nia grupa



Lernolibroj de Esperanto: Ĉu ni havas kaj uzas la ĝustajn?

semajnojn (ili nur miksis iom pli vortoformojn de antaŭe sciataj lingvoj kun tiuj de Esperanto, ekz. *regardis...*, *rispondis...*). La grupo estis tre malgranda kaj tial la tempo necesa estis tiel mallonga. Krome, temis pri lingvo-studentinoj, kiuj konis jam unu aŭ du lingvojn. Tamen, nun eblas konkludi: tiaj semajnfinaĵ 10–15-horaj kursoj povas transdoni sufiĉe kompletan scion al malgrandaj grupoj (ideale 5 – 8 personoj), kiu ebligas bazan konversa-

cikapablon. Sed, ĉefe, tiaj kursoj lasas enrigardon en la kompletan E-strukturon kaj kaptas la lernantojn por la Movado. Poste necesas ebligi al ili aktivan partoprenon en la kluba vivo, eventuale daŭrigi la lernadon kaj antaŭ ĉio plani vojaĝojn al internaciaj E-araĝoj. Tiajn kursojn pro ilia mallonga daŭro sukcese finas 90 – 100% de la anoncitoj.

Kial jam menciite, la nova kursmaterialo havis ankaŭ la intencon ebligi kursgvidadon al komencantoj, por tiel rapide disvastigi la Movadon sur terenoj kie ni ne havas E-societojn. En la respubliko Kroatio (Jugoslavio) jam unu jaron oni aplikas la novan sistemon. La plej sukcesaj estis la provoj en Osijek kaj Koprivnica kiuj dum deko da monatoj kreis dekojn da kursoj en la du urboj kaj vilaĝoj ĉirkaŭ ili, kun pli ol 500 lernantoj. Jen ŝanco por la amaseco.

La materialoj estas dulingvaj: kroatserbaj kaj Esperantaj. Tial povas uzi ilin ankaŭ mendantoj ekster Jugoslavio, ĉar facilas adapti ilin al la propaj lingvoj. Volonte ni disponigos ilin kaj post la apliko ricevus sugestojn kaj kritikojn, por povi ellabori ankoraŭ pli bonan materialon, kiu povus prezenti revolucion en la Esperanto-instruado! (Skribu al: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio).

Zlatko Tišljarić

Leterkesto

biblioteko ne kaŝiĝas en nepublika kunvenejo sed estas surbretigita en la publika urba biblioteko. Tiel niajn librojn vidos ankaŭ tiuj uzantoj de la biblioteko, kiuj ne venas tien por serĉi Esperantajn librojn.

Alois Eder, FR Germanio

Einstein kaj Esperanto

En la marta numero vi citas el la libro *Pri internacia lingvo dum jarcentoj* de I. Dratwer kaj aldonas, ke mankas klaraj fontindikoj. Mi ne povas doni fontindikon por la citita eldiro de Einstein, sed mi povas montri al la Jarlibro de SAT por la jaro 1924, kie inter la paĝoj 8 kaj 9 estas bildo de Einstein, kun la informo ke li estas honora prezidanto de la 3a SAT-kongreso (Kassel, 1923), kaj kun jena citaĵo el letero de Einstein: "...mi deziras plej bonan sukceson al via entrepreno."

Kontraŭa informo troviĝas en recenzo pri la libro de Dratwer en *Esperanto*, novembro 1977, p. 191-192. En tiu recenzo Solzbacher diras, ke en letero al li de Einstein ĉirkaŭ la jaro 1950, Einstein skribis ke li ne favoras kaj neniam favoris Esperanton.

Olav Reiersøl, Norvegio

Okulo por okulo

S-ro Michel Duc Goninaz recenzis en la revuo *Esperanto* (maja n-ro, p. 90) libron de d-ro Detlev Blanke *Esperanto: – lingvo, movado, instruado*. Li atakas precipe artikolon de mi, aperintan en 1968 kaj represitan

en la ĉi-supre menciita libro, kaj li bombardas min per *samideanaj* kaj *afablaj* epitetoj kiel "facilanima", "senscia", kaj eĉ "stalinisme mensoga". Bedaŭrinda preseraro, pri kiu evidente mi ne respondecas, fariĝas preteksto por aldoni "senscia". Mi simple rimarkas, ke la volonte insulta vorto "stalinisma", notinde, estas tre laŭmoda sed uzata **senscie** kaj **mensoge** en la plej reakciaj rondoj. Akcesore mi notas, ke tio aperas en la oficiala organo de UEA, principe neŭtrala politike.

W. Gilbert, Francio

Redakcia noto: S-ro Gilbert sendis al ni multe pli ampleksan tekston, kiun ni bedaŭrinde ne povis aperigi komplete. Tamen, ĝi aperis en sia plena formo en *Paco*, n-ro 5/1979, p. 14.

Kie do estas la limo?

Ne signifas ke mi estas ĝisosta Frostavalano [la skribanto celas la Principaron de Frostavallen pri la informa laboro por Esperanto, akceptita en 1956], se mi demandas al vi, ĉu vi ne mem ankaŭ sentis/as, ke la tutpaĝa anonco (oktobra numero, p. 180) transpaŝas certan limon de tolerebleco. Oni prave povus demandi, ĉu UEA tiom bezonegas la 1 000 guldenojn por permesi, ke tia obskura megalomaniaĵo eniru por ĉiam la presitan realon de la Esperanto-movado. Kie estas la limo por obsceno, malvero, kalumnio kaj megalomanio, ĉe kiu vi rifuzus publikigon de anonco?

D-ro H.M. Maitzen, Aŭstrio

Astronomia pioniraĵo

Recenzas Hans Michael Maitzen (Aŭstrio):

Astronomia foto-atlaso, de A. Heck kaj J. Manfred. Liège: Editions Descœr S.A., 1978 (ne indikita). 224p. Ilus. 24cm. Bindita.

La astronomia bildlibro de la du junaj lieĝaj astronomoj estas konsiderinda kiel pioniraĵo de la astronomia fakliteraturo en la Internacia Lingvo. Iom laŭ la ekzemplo de la astronomia klasikulo esperantista, prof. Minnaert, eldoninto de la fama dulingva (angla, Esperanto) *Fotometria atlaso de la sunospekto* (1940), la aŭtoroj aldonis al la angla, franca, germana kaj hispana la Internacian Lingvon, por priskribi la astrofotojn de ĉi-verko. Tiuj fotoj estas bonkvalitaj, kvankam bedaŭrinde nur nigrablankaj (multaj astronomiaj objektoj elmontras kolorecon, kiu ne nur science interesas).

La pionira karaktero rilatas la vortfaradon kaj la plivastigon de la astronomia nomenklaturaro. La nuna stato sur tiu kampo ne estas kontentiga. Eble la seslingva terminaro de J. Kleczek (1961) povos fariĝi bazo por astronomia vortaro en la Internacia Lingvo. En la Someraj Universitataj Kursoj 1978 en Lieĝo, kie la recenzanto gvidis la sekcion astronomio, dum tri semajnoj okazis vigla terminologia diskutado post la unuopaj lekcioj, kies fruktoj post certa tempo aperos. Iomete ĝi tuŝis ankaŭ terminojn uzatajn en ĉi-libro. Jen mallonga diskuto de "problemecaj" terminoj (HM staras por la aŭtoroj de la recenzata libro):

- 1) HM uzas "variantaj steloj"; pli konvena estus (ankaŭ laŭ PIV) "variaj steloj".
 - 2) "Uranuso" de HM kontrastas la PIV-an "Urano".
 - 3) Estas preferinde karakterizi la helecon de astroj per la adjektivoj "brila" aŭ "luma" anstataŭ la HM-a "brilanta".
 - 4) "Spikolo" (suna surfac-fenomeno) estas nova termino, senriproĉe internacia!
 - 5) Ĉe la esperantigo de la diversaj nebuloz-nomoj oni rekte sentas la franclingvan originon de la aŭtoroj: iomete komplike ili ekz. diras "La nebulozo de la Krabo" anstataŭ la pli praktika "Krab-nebulozo". La francdeveneco de: "La nebulozo de la Punto" estas ankaŭ evidenta; pli internacia estus "Vualnebulozo". Cetere ankaŭ la germana traduko "Netzwerknebel", kvankam ne erara, tamen estas eksterkutima, ĉar normale oni diras "Schleiernebel".
- La aŭtoroj ne tradukis la anglan "Dumbbell", kvankam almenaŭ en la germana "Hantelnebel" estas ĝenerale konata, kaj al tio bone respondus "Halter-nebulozo". Kial ne ankaŭ diri "Helic-nebulozo" anstataŭ la ne-esperanta "nebulozo Helix"? La konstelacio, en kiu tiu nebulozo cetere

lokiĝas laŭ la traduko de HM estas la "Amforo". Tiu termino vere ne estas internacia, kaj mi forte pledas por "Akvulo"! "Tarantulo" estas ĝusta laŭ PIV, ne "Tarentulo" laŭ HM.

- 6) Anstataŭ "sfera stelamaso" oni pli internacie povus uzi "globa stelamaso".
- 7) La koncerna konstelacio nomiĝas "Virgo" laŭ PIV, ne "Virgulino".
- 8) Se objekto ne kongruas kun certaj klasifikaj normoj, mi proponas nomi ĝin "pekuliara" anstataŭ "neordinara", ĉar la semantiko de ĉi-lasto pli forte celas la kvantan, ne la kvalitan devion de la mez-nombra konduto.
- 9) "Interreagantaj galaksioj" sonas pli komplike ol "interagaj galaksioj".
- 10) "Fotoj de Marso prenitaj en ruĝa lumo" kompreneble signifas, ke oni fotis Marson tra ruĝa filtro, ne ĉe ruĝa lumo. Tial la germana kaj hispana tradukaĵoj: "bei rotem Licht" kaj "con luz roja" estas eraraj. Ĝustaj estus "im rotem Licht" kaj "en luz roja".

Post tiu listigo de diskutindaĵoj restas konklude emfazi, ke tiu entrepreno estas ambicia kaj utila, kaj por la konatigo de la astronomiaj objektoj (eĉ se mankas pli detalaj klarigoj) al vasta publiko interesita pri astronomio, kaj por la partopreno de la Internacia Lingvo en la koncerto de pluraj grandaj lingvoj.

Mendu ĉe UEA: 54,90 (por Nederlando 57,10) gld., plus sendokostoj 10%.

Ne nur provo, sed plena sukceso

Recenzas Aldo de' Giorgi (Italio):

El la nova ĝardeno / Dal nuovo giardino; Originalaj poemoj itallingven tradukitaj el Esperanto, de Dante Bertolini. Locarno: Edizioni Pedrazzini, 1979. 103p. 21cm. Bind.

Eble finfine inversiĝas la ĝenerala tendenco: anstataŭ la kutimaj tradukoj el (pli-malpli ĉefverkaj) nacilingvaĵoj, jen ĉi-kaze trafe elektita kolekto de Esperanta poezio tradukita itallingven. La svisa Dante Bertolini liveras belaspektan libron kun ambaŭ versioj, originala kaj italigita, de 26 poemoj el Zamenhof, Frenkel, Privat, Kalocsay, Baghy, Schwartz, Auld, Rossetti, Boulton, Ragnarsson. Tazio Carlevaro aldonas tre skizajn antaŭparolon, aŭtorbiografiojn, komentarietojn.

"Ĉi tiu libro estas provo", skribas iom singarde Carlevaro. Nu, laŭ mi la tradukinto sufiĉe brile superis tiun malfacilan provon: sonetoj, tercinoj, rondeloj kaj tankaĵoj estas lerte kaj ĝustametrike redonitaj; skandoj

kaj rimoj fluas plaĉe, preskaŭ ĉiam en bona sintezo inter la ofte diverĝaj postuloj de fideleco kaj poezieco; tre malofte apartaj signifoj estas preterlasitaj. Sukcesa ankaŭ la zorgo rekrei kelkajn specialajn efektojn, ekzemple la Baghy-ajn aliteraciojn de "Siberia lulkan-to" (hirte flirte = irti ritti, brue skue = rude crudo, k.s.) aŭ la Schwartz-ajn vortĉenojn de "La diversaj aĝoj de l' homo" (etaĝo, miraĝo ktp. = maggio, miraggio, coraggio, viaggio k.s.), kvankam la dusenceco de la originalo perdiĝis.

Recenzista devo estas ankaŭ ne preteratenti mankojn (kvankam multaj emas tion forgesi, pro ia verdisma solidarindulgo). Jen lupee serĉinte: oni povas eble kritiketi, ke Bertolini elektis preskaŭ ekskluzive kla-

tindaj etuloj. Eĉ ne pri simpla lingvaĵo. Infanoj ja ŝatas stimulojn, ankaŭ lingvajn (se la plenkreskuloj ne tro ofte diras: tio estas tro malfacila por vi). Certe plej multaj el inter vi devos foje iom cerbumi, kiam la juna leganto petas klarigon pri iu esprimo. Sed la poemoj estas interesokaptaj, variaj, surprizaj — kaj tiel neniu infano, kiu iom libere esprimas sin per Esperanto, estos ĝenata de iom da enkapa aktiveco. Jen fine libreto por infanoj kiuj, kvankam ili estas junaj, ne estas komen-cantoj. Kaj komencantoj simple iom pli penu. Ekde kiu aĝo? Eble 8, eble 9 jaroj. Sed la iom pli aĝaj certe ne forĵetus ĝin. Kaj aĝuloj kiel vi? Provu!

Mendu ĉe UEA: 16,20 (por Nederlando 16,85) gld., plus sendokostoj 10%.

Traduko por admirari, muziko por ĝui



Recenzas Diccon Masterman (FR Germanio):

La piratoj de Penzanco aŭ Sklavo de la devo (1879), de W.S. Gilbert. Tradukis Reto Rossetti. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1979. 39p. 21cm. ISBN 0 9505323 4 7.

La piratoj de Penzanco, teksto de W.S. Gilbert, muziko de A. Sullivan. Traduko de R. Rossetti en prezento de Esperanta Opero-Societo. Bristolo, 1979. Kaseto stereofona, 100 min. Registro: P. Schilperoord.

La unua prezento de tiu ĉi farsa opero okazis en marborda urbeto en Anglujo la 30an de decembro 1879, por establi ĝian kopirajton. Tamen, la vera debuto okazis la 31an de decembro en Nov-Jorko sub la muzika gvido de la komponisto, kiu estis verkinta la uverturon inter la 1a kaj 5a horo de la sama tago! Malgraŭe, ĝi tuj furoris. Por festi la centjaran datrevenon de tiu ĉi majstraĵo de la genia duopo W.S. Gilbert kaj A. Sullivan, la Esperanta Opero-Societo, subtenita de la Londona Esperanto-Horo, prezentis la operon jam dufoje en Britujo.

Oni nur povas admirari tiun, kiu provas traduki Gilbert, ĉar la teksto entenas vortludojn, sensencaĵojn, tute anglecajn humuraĵojn kaj estas multrilate ligita al lia epoko. Eĉ anglo hodiaŭ maltrafos plurajn aludojn. Plie, multaj kantoj havas mallongajn, tre malfacile tradukeblajn versojn, ne nur pro la senco sed ankaŭ pro la muzika akcento. Fronte al tiuj ĉi timindaj problemoj, la tradukinto estas ekspluatinta diversajn ruzojn por fari sian taskon: li ŝanĝis la sencon de la originalo (foje iom draste), enkondukis novajn kaj malnovajn neologismojn, kaj kreis siajn proprajn Esperanto-vortludojn. Mi nur povas admirari kaj laŭdi la rezulton, kvankam mi kelkrilate bedaŭras la metodojn. La kantkvalito de la surbendigita prezento estas amatora sed kun pluraj bonaj solistoj. La akompano estas per foje erara piano, ne orkestro. La kaseto entenas nur la muzikajn erojn kun interkantaj, parolitaj klariĝoj pri la drama disvolviĝo. Oftaj ŝanĝoj de la teksto



sikaĵojn, tiel ke la itala leganto povus ricevi la impreson (cetere ne tro malveran), ke nia poetiko iom arkaikemas, postrestas. Ke li, konsekvence, ankaŭ uzas iome malnovmodan italan. Ke la mirinde kompakta kaj konceptodensa "Sur la monto Nebo" de Kalocsay estas nepre netradukebla (kaj fakte ĝi estas tute fuŝita). Kaj nemulton alian.

Kion konkludi? Simple, ke nia kulturo tiajn propagandilojn nepre bezonas. Kaj ke Bertolini provizis sekwindan ekzemplon, kiun ne nur itallingvanoj povas fide aĉeti por ĝui la proprajn komparojn.

Mendu ĉe UEA: 33,60 (por Nederlando 34,94) gld., plus sendokostoj 10%.

Ankaŭ por aĝuloj

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Poezia bukedo por geknaboj de la mondo, de Bertram Potts (1895-). Tenmori: Amo-Akademio, 1978. 102p. Ilus. 19cm.

Poezia bukedo por geknaboj. Sed ne miskomprenu: Ne temas pri "infanecaj poeziaĵoj", nek pri rimaĵoj (kvankam ili rimas). Temas pri bona, plaĉa, stimula, amuza legaĵo por legantoj, kiuj ne tro maljuniĝis, kiuj ankoraŭ kapablas surpriziĝi. Ankaŭ ne temas pri lingvaĵo ĉirkaŭhakita por faciligi la legadon al la kompa-

kredigas, ke la presita traduko ne ĉiam estas facile kantebla.

La surbendigo estas de sursceneja, efektiva prezento, kaj ne de registreja, senmakuligita kunmetaĵo. Mi rekomendas al tiuj, kiuj volas aĉeti la kaseton aŭ ĉeesti la operon, nepre kune aĉeti la tekston. Kaj, eĉ se vi ne komprenos la tutan humuron, vi apenaŭ povos malĝui la ravan, korlevan muzikon de Sullivan.

Mendu ĉe UEA: La libro: 8,70 (por Nederlando 9,05) gld.; la kaseto: 21,60 (por Nederlando 25,49) gld., plus sendokostoj 10%.

Ne por fieri

Recenzas Boris G. Kolker (Soveta Unio):

Laŭ e...fika maniero kaj Nova e...fiko, de Fikspronulo (pseŭd.). Sen eldonindikoj (1978?). 96+96p. 18cm. Bind.

Sendube, la intima vivo de la homo rajtas esti temo de literaturo. Kaj Esperanta literaturo povas fieri pri kelkaj tiaspecaj libroj, ekzemple *Libro de amo* de Peter Peneter, du libroj pri sentaŭguloj el Bervalo de L. Beaucaire, *ABZ de amo* de I. kaj S. Hegeler (serioza popularscienca verko).

Estas dubinde, ĉu Esperanta literaturo povos fieri pri la kvar prezentataj broŝuroj, kiuj nun aperas en unu bindita volumo. Tio koncernas tiel enhavon, kiel presmanieron. Mi vidis en ili nuran remaĉadon de obscenaĵoj kun nenia estimo al homa digno. Certe, sprito estas nocio subjektiva, sed mi ne trovis la anekdotojn tre spritaj. Ioman intereson povus prezenti vortara kompilaĵo, kvankam ĝi ne estas komparebla al tiu de *Sekretaj sonetoj*.

Mendu ĉe UEA: 21,00 (por Nederlando 21,84) gld., plus sendokostoj 10%.

Sciura kolekto, sed utila

Recenzas Teodor Montano (Tobago):

Granda galerio Zamenhofa 2, de Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1978. 419p. 30cm. Bindita.

Amantoj de familiaj albumoj kaj de tiuj muzeoj de malgrandaj eŭropaj urboj, kiuj mirakle evitis ankoraŭ la raciigan manon de moderniganto, trovos en la nova volumo de la *Granda galerio* veran festenon. En la unua volumo (1973), Holzhaus arigis amason da fotoj de Zamenhof, liaj parencoj, la lokoj kiujn li vizitis, dokumentoj, titolpaĝoj ktp. (bedaŭrinde, cetere, ke Zamenhof ne estis hundamanto), kaj ilin kunmetis, kune kun kvanto de alia malpli laŭtema materialo, en grandegan piedpistan volumon. La dua volumo sekvas similan prezenton, sed eĉ pli diskonfuzan ĉar ĝi estas esence suplementa al la unua. Jen, do, Zamenhof "rigardas dekstren" aŭ "rigardas iomete dekstren". Jen Klara Zamenhof en aŭtomobilo. Jen (aliflanke)

abunda interesege dumkongresa fotomaterialo, kaj lastaj poŝtkartoj de Lidia Zamenhof, kun tiu terura stampo "Judenrat Warschau" en unu angulo. Jen la stacidomo de Antverpeno — el ok diversaj vidpunktoj. Jen la Zamenhof-monumento en Fortaleza de antaŭe, maldekstre, dekstre kaj (kial ne?) de malantaŭe. Abundaj notoj, ofte kun tute novaj historiaj informoj, donas enrigardon al multaj bildoj, sed plej elementaj informoj (scieblaj de Holzhaus) mankas ĉe aliaj. S-ino Karla Olsson estas abunde laŭdata (p. 403) kaj la kompatinda urbestro de Sassnitz estas konsternigante draŝata (p. 51); nomoj estas misliterumitaj; eĉ du paĝoj estas presitaj inverse (ne tiom gravis al mi, ĉar ĉiuokaze unu el ili estas tute en la rusa lingvo, kiun hazarde mi ne scipovas). Holzhaus kolektas faktojn kaj fotojn kiel sciuro nuksojn — kaj, kun preskaŭ beata rifuzo distingi inter gravo kaj malgravo, disŝutas ilin antaŭ la publikon kiel perlojn forgesitajn. Sed eĉ se la sciura kvalitkontrolo foje lamas, la volumo liveras valoran krudan materialon al esperantologoj kaj interesegegan legaĵon al Esperanto-amatoroj.

Mendu ĉe UEA: 112,20 (por Nederlando 116,69) gld., plus sendokostoj 10%.

Kontraŭ eŭrocentrismo

Recenzas Charles R.L. Power (Nederlando):

Japana variacio. Redaktis M. Miyamoto kaj M. Ueyama. Kioto: L'omnibuso, 1978. 139p. 19cm.

Ni ŝatas rigardi la Esperanto-movadon kiel tutmondan komunumon. Tamen, ekzistas pluraj esperantistaj "komunumoj", el kiuj ekz. la nederlanda, la usona, la bulgara kaj la brazila havas tre apartajn karakterizojn. Kaj pli ol kutime aparta, estas la floranta japana Esperanto-movado.

Tiun apartecon akcentas ĉi tiu, la dua (post *Japana kvodlibeto*, 1965), grava kompilaĵo de originalaj japanaj verkoj en Esperanto. Ĝia enhavo grandparte aperis antaŭe en *L'omnibuso*, modesta kultura revuo, kiu enhave, se ne grafike, povus rivali la pli konatan *Literatura Foiro*. Eĉ kulturkonsciaj esperantistoj suferas tro ofte je eŭrocentrismo.

Kontraŭ tiu malsano *Japana variacio* estas bona rimedo. La pecoj estas ege variaj; koheron oni ne serĉu ĉi tie. Sed unu karakterizo estas pli ol atendeble ofta: aŭtobiografiemo. Estas en iuj kazoj malfacile decidi, ĉu temas pri historioj aŭtobiografiaj, ĉu pri fikciaĵoj. Tiu konfuzo estiĝas ankaŭ ĉe la romanoj verkitaĵ de japanoj — *Matenruĝo* de Oka kaj *Naskitaĵ sur la ruino* de Miyamoto. Ambaŭ kontribuas ankaŭ ĉi tie, la dua per raporto pri sinmortiga provo, kiun li iam faris komune kun putino. Ankaŭ kuracisto, komunisto kaj soldato rakontas vivepizodojn. Eĉ la versoj de Ueyama, kiuj funebras lian edzinon, havas tre aŭtobiografian karakteron.

Noveloj, poemoj, eseoj (pri japanaj studentaj kantoj, pri Esperanta amatoreco, pri la usona poeto Walt

Whitman), eĉ simplaj leteroj, de dek naŭ aŭtoroj. Plurajn el ili neĵapanaj esperantistoj devus pli bone koni.

Mendu ĉe UEA: 16,80 (por Nederlando 17,47) gld. plus sendokostoj 10%.

Malfortoj de la ĉeftezo

Recenzas Geoffrey Sutton (Finnlando):

Pri Esperanta tradukarto de Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979. 71p. 20cm.

Jen aperis bone presita prelegaro de sperta tradukanto, abunda je saĝaj rimarkoj kaj konsiloj por estontaj tradukemuloj. Notendas tamen, ke la verko ĉefe prezentas la personajn tezojn de de Diego mem. La verkinto ĉeftezas, ke Esperanto evoluas el primitiva skemeco al esprimpova naturalismo. Nur la naturalismo, laŭ li, donas al tradukanto la necesajn lingvajn rimedojn por taŭga laborplenumo. Li tiel propagandas eviton de kunmetoj kaj afiksoj.

De Diego misapogas sian tezon konstatante, ke la strukturo de iuj etnaj lingvoj evoluis de aglutina al analiza. Sed konstati eblecon pravas nek naturleĝon nek dezirindecon. Foje li priskribas faktajn limigojn de la skemeco, sed plej ofte la opinioj de de Diego estas pridubindaj aŭ malĝustaj. Li ankaŭ akuzas apogantojn de skemeco pri unueca kaj kruda argumentado, kio estas ĝeneraligo nedefendebila. Al ĉi tiu verko ne mankas provo atesti la zamenhofecon de ĝiaj hipotezoj. Sed, kiel de Diego mem devas konstati, Esperanto estas intencita kompromiso inter skemeco kaj naturalismo. Zamenhofa citaĵo el

la Esperantisto de 1891 ne konvinkas, ĉar ĝi fontas el la jaroj de reformemo. La fruaj jaroj ankaŭ postulis pli grandan kapitulacon sub eksterulaj mokoĵ pri supozita nenatureco de Esperantaj lingvoformoj. De Diego bedaŭrinde daŭrigas la miton. Lingva formo estas natura, se ĝi estas nature uzata. Natureco ne dependas de mistika asociiĝo kun etna lingvo. Vortkunmeto konsiderata nenatura de hispano povas esti ĉiutagaĵo por alilingvano.

De Diego atakas la aglutinan strukturon de Esperanto, kiu sola kontraŭpezas ĝian hind-eŭropan vortaron por aserti ian tutmondecon. Kial, oni demandas sin, venas la neologismoj de de Diego ĉiam el latinidaj lingvoj? Ĉu Esperanto ne havas ankaŭ ĝermanan kaj slavan bazon? Eble al de Diego mankas la "naturaj asociacioj" el ĉi tiuj lingvoj.

La prelegaron de de Diego la leganto nepre komparu kun la elokventa artikolo "La okcidenta dialekto" de Claude Piron, kiu aperis en la julia-aŭgusta numero de la revuo *Esperanto*, 1977.

Efika uzo de la skemeco de Esperanto postulas pli da kapablo, ol labila uzo de neologismoj. De Diego konfuzas mankon de kapablo ĉe tradukantoj kun ecoj de la sinteza strukturo de Esperanto. Sed fin-analize temas pri demando de grado en la kompromiso. Feliĉe de Diego ne estas multe tro ekstrema en sia lingvouzo, kaj pledado por neologismoj tamen iĝas lancado kontraŭ mueliloj en tiuj kazoj, kiam la nova vorto plene maltaŭgas simple pro la neceso plej facile kompreni kaj komprenigi.

Mendu ĉe UEA: 11,70 (por Nederlando 12,17) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Dekdu piedetoj (1964), Marjorie Boulton (1924-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979 (fotorepreso). 34+4p. Ilus. 19cm. La renoma poetino rakontas pri tri el siaj katoj (Petro, Aristotelo kaj Montevideo). Prezo: 7,50 gld.

Esperanto in rubrieken, W.H.W. van Liempt. Bodegraven: Stichting Esperanto bij het Onderwijs, 1979. 147p. 22cm. Laŭtema vortaro kun terminoj ĉefe el la ĉiutaga vivo. Kun i.a. nederlanda-Esperanta proverbaro. Prezo: 18,00 gld.

Ferio en realo, Wallace Stevens (1879-1955). El la angla trad. Kris Long k.a. Bracknell: La tradukinto, 1979. 96p. 15cm. Trideko da verkoj de moderna usona poeto. Prezo: 6,00 gld.

Fervoja leksikono, André Blondeaux. Unio Arta kaj Intelektala de la Francaj Fervojistoj/Franca Fervojista Esperanto-Asocio, 1978. 3+165p. 22cm. Franca-Esperanta. Prezo: 16,00 gld.

Hungaraj fabeloj, Elek Benedek (1859-1929). El la hungara trad. Mária Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 71p. Ilus. de Ida Csáky. 20cm. ISBN 963 571 061 5. Dek rakontoj de la hungara Andersen. Prezo: 10,20 gld.

Invito al go-ludo, Minosuke Emori. Japano Esperantista Go-Asocio, 1979. 51p. Ilus. 21cm. Plena enkonduko al la antikva sed ĉiam populara azia tabulludo. Prezo: 8,40 gld.

Jihetuan-movado, Kompila Grupo por la Broŝuroj pri la "Moderna Ĉina Historio". El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 7+86p. Ilus. 19cm. 11-Es-1374P. Pri kontraŭimperiisma popoleviĝo en Ĉinio en 1900. Prezo: 2,10 gld.

Kurdoj, armenoj kaj aliaj etnoj inter la Kaspia, Nigra kaj Mediteranea Maroj. Red. Uwe Joachim Moritz. Stolberg: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, 1979. 20p. Ilus. 30cm. Artikoloj represitaj el *Etnismo*. Prezo: 3,00 gld.

Mortintoj kaj la mortantoj, La, Nassif Isaac (1912-). Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1979. 64p. 21cm. Studo pri reenkarigiĝo. Prezo: 6,00 gld.

Nealianciteco — Konscienco de la homaro, La, Josip Broz Tito (1892-). Tradukis Senad Čolič. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1979. 99p. 20cm. Paroladoj faritaj ĉe konferencoj de nealiancitaj ŝtatoj, 1961-1978. Prezo: 5,30 gld.

Reforma movado de 1898, La, Kompila Grupo por la broŝuroj pri la "Moderna Ĉina Historio". El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1979. 7+93p. 11-Es-1371P. Pri burĝa reformmovado kies malsukceso montris la vojon al la ĉina revolucio. Prezo: 2,10 gld.

Tolstoj, L.: **Leo Tolstoj; La homo, la verkisto kaj la reformisto**, Victor Lebrun (1882-). Ascoli Piceno: Gabrielli, 1978. 402+23p. Ilus. 20cm. Plejado 10. Biografio verkita en Esperanto de la persona sekretario de la aŭtoro de *Milito kaj paco*. Prezo: 45,00 gld.

Wörterbuch der Internationalen Sprache (1932?), Teo Jung (1892-). Alsbach: Leuchtturm-Verlag, 1979 (fotorepreso kun nova materialo). 8+148p. 21cm. ISBN 3 88064 074 2. Eŭropa Serio "Sennaciigita Scienco" 3. Konciza dudirekta vortaro kun apendicaj konsiloj pri korespondado. Prezo: 18,00 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— gld.**

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

Ĉu Japanio movadas por si mem?

Zdravka Metz, estrarano de TEJO pri regiona agado, lastatempe estis en Japanio. Ŝi ĉi tie revuas la japanan junularan Esperanto-movadon.

MULTAJ NEJAPANOJ jesu la titolan demandon, kaj kiel pruvon tuj dirus: "Vidu, ili preskaŭ ne agas ekster Japanio". Tiuj eble pravus el eŭropa vidpunkto, sed la japanoj ne samopinias, nek mi post mia vizito al Japanio. Vere ili movadas eĉ pli serioze ol en aliaj landoj, kaj ne nur en Japanio inter kaj por si mem. Kun ĝojo ili elkomore gastigas ĉiujn eksterlandajn esperantistojn kaj organizas por ili ne nur vizitojn al Esperantaj rondoj, sed ankaŭ prelegojn antaŭ publiko aŭ vizitojn al neesperantistoj.

En Tokio troviĝas Japana Esperanto-Instituto (JEI) kaj la Esperanto-Domo, kie oni deĵoras, laboras, agas ĉiutage. Aldone, oni devus scii pri la plej aktivaj gejunuloj de Kansaja Ligo de Esperanto-Gejunuloj (KLEG, kiel mallongiĝas ankaŭ la pli granda samregiona organizaĵo Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj). KLEG organizas la "friskan lernejon" — la plej seriozan kunloĝadon kiun mi entute vidis inter esperantistaj renkontiĝoj. La labortago en tiu lernejo disvolviĝis jene: frumatena lernado komenciĝis je la kvina; ĝi ne estis deviga kaj ĉeestis kvarono de la partoprenantoj. Post la sesa estis vekiĝo por ĉiuj kaj gimnastiko por dezirantoj. Matenmanĝo okazis de la sepa, komuna bablado, laŭ tre japaneca maniero, je la oka. Post kvarona horo komenciĝis kursoj en multaj klasoj, laŭ la jama lingva scio. Tagmeze estis unuhora paŭzo por tagmanĝo kaj tuj poste denove lecionoj. Sekvis vespermanĝo kaj komunaj amuzoj ĝis la deka horo: dancoj, kantoj, eble ia prelego aŭ kultura ero. Nokte oni povis daŭre kaj senĝene babili en t.n. "paradizo", dum la organizantoj laboradis en ĉambro "infero"!

KLEG konsistas el 15 apartaj rondoj, ĉiu kun reprezentantoj en la ligo. La ligo havas plurajn fakojn: la internacia prizorgas korespondpetojn kaj organizas vojaĝojn eksterlanden. Kontaktpersono: Tutomu Nisio (Tenzin 2-11-7, Ikeda-si, 563 Japanio).

En tre proksima urbo, Kioto, troviĝas la junulara Rondo Harmonia. Kioto estas ĝia centro kaj en preskaŭ ĉiu granda urbo ekzistas filio. Ĝi havas ĉ. 1 000 anojn, el kiuj 100 — 200 vere aktivas. Kontaktpersono: Osamu Huzioka (Midori 50, 11-4 Narutaki-hon-mati, Ukyou-ku, Kioto, 616 Japanio).

En Tokio mem estas pluraj universitatoj kaj ĉe kelkaj la esperantistoj-studentoj organizis kursojn kaj eldonas

bultenojn. Oni fondis Tokian Esperantan Ligon de Studentoj (TELS); ankaŭ en Tokio estas filio de Rondo Harmonia. Kontaktpersono: Yukio Izumi (Sei-Dominiko-Ryo, 1-33-11 Sannō, Ōta-ku, Tokio, 143 Japanio). Troviĝas en Tokio ankoraŭ unu interesa rondo: Rondo Hobio, al kiu apartenas ankaŭ kelkaj neesperantistoj — pli ol 20 personoj. Mi vizitis unu hobigrupon, kiu prizorgas Esperanto-instruadon al infanoj, kun la celo lude lernigi la lingvon. Kontaktpersono: Sonoko Kuzume (1161 Izumi, Komae-shi, Tokio).

En Japanio troviĝas 4 000 organizitaj esperantistoj, laŭ Moritaka Oŝioka, sekretario de JEI. Mi supozas, laŭ interparoloj kaj memoro, ke ĉ. 1 500 estas gejunuloj. Multaj esperantistoj diris ke mi ne forgesu ke por japanoj Esperanto estas tre malfacila lingvo pro la vortordo kaj pro tio, ke japanoj ne konas eŭropajn lingvojn, kiuj por ili estas eĉ pli malfacilaj.

Japanoj ŝatas gastojn. Ili malfermas pordon ĉiam kaj ĉie. Kelkaj havas okazon vojaĝi eksterlanden kaj konatiĝi kun diversaj popoloj, landoj kaj movadoj. Sed ili ne estas bone informitaj pri TEJO, kaj tial mem ne aktivas en ĝi. Tamen, multaj esprimis al mi deziron kunlabori, kaj eble tre baldaŭ ili organizos propran landan sektion.

Konklude do, Japanio troviĝas malproksime de la tradiciaj movadaj centroj, kaj tio kaŭzis, ke la japana movado orientiĝis al si mem. Oni tie tre aktivas por disvastigi la utiligon de Esperanto enlande. Krome, multaj esperantistoj entuziasme multon faras ekster sia rondo. Aliflanke, ni malofte estas bone informitaj pri Japanio, sed tio certe ne signifas, ke la japana movado estas fermita.

Zdravka Metz

Impulso el la Sudo

NE MANKAS periodaĵoj en la Esperanto-movado. Eĉ se ni ja suferas pro la manko de aliaj necesaj bultenoj, bultenojn, revuojn, magazinojn, laŭnome kaj laŭnombro, ni certe havas en la kvantoj, kiuj superas la movadajn bezonojn. Alia demando estas, ĉu tiun titolan inundon akompanas ankaŭ la necesa kvalito. Plejofte — ne. Male. Tamen, kiam aperas nova junulara gazeto, precipe se ĝi venas el Brazilo kaj se ĝi estas bela kaj bonkvalita, ĝi ja meritas plenan atenton. Temas pri *Impulso*, "oficiala organo de BEJO" (Brazila Esperantista Junulara Organizo). Tiu aliĝinta landa sekcio de TEJO jam antaŭe surprizis la junularan movadan mondon per la fondo de propra teatra grupo (BRATEG), kiu ŝajne ekklamis post la komencaj sukcesoj. Ĉu *Impulso* havos pli bonan sorton? La unua numero aperis komence de aŭgusto 1979 (tiam ĝi atingis nin). Ĝi portas la indikon "januaro-februaro-marto 1979". Ĉu oni tie en Brazilo bezonas plian impulson por eldoni novan numeron de *Impulso*? Jen ĝi, se pri tio temas! Cetere, TEJO bezonas fortan landan sektion en Brazilo, precipe nun, kiam ĝi insiste volas okazigi la 38an Internacian Junularan Kongreson en tiu lando en 1981. *Impulso* povus helpi ĉi-rilate.



Kongresa Komunikado

**65a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Stokholmo (Svedio)
1980 08 02 – 09**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Adreso de LKK: Box 4009,
S-122 04 Stockholm-Enskede, Svedio**

Alta Protektanto parlamenta prezidanto. La titolon de Alta Protektanto de la 65a Universala Kongreso akceptis s-ro Ingemund Bengtsson, prezidanto de la Sveda Parlamento. S-ro Bengtsson, kiu elektigis kiel parlamenta prezidanto en septembro 1979, estis antaŭe ministro en la sveda registaro.

Collinder kaj Palme en la Honora Komitato. Inter tiuj, kiuj jam akceptis lokon en la Honora Komitato de la 65a UK estas eksĉefministro de Svedio Olof Palme, kaj Björn Collinder, mondfama emerita profesoro de finugraj lingvoj (Universitato de Uppsala), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Aliaj membroj estas stokholma romanisto Per Anders Fogelström, Nobel-premiito (1970) pri fiziko Hannes Alfvén, epi-

skopo de Stokholmo Lars Carlzon kaj Torgny Segerstedt (eksrektoro de la Universitato de Uppsala kaj membro de la Sveda Akademio).

Ekskurso pri etnoj. Sub gvido de Uwe Joachim Moritz pretiĝas seminario pri "Esperanto kaj enŝtataj etnaj lingvoj". Tiu seminario, kiu celas precipe gvidantojn de la landaj asocioj, prenos la formon de tuttaga ekskurso, per ŝipo, al la sveda insulo Åland.

Infanoj en Elfarbaro. Samtempe kun la 65a UK, la plej junaj esperantistoj kunvenos en la 18a Internacia Infana Kongreseto en Elvskogen (Elfarbaro), proks. 30 km. for de la stokholma urbocentro. Ili loĝos en dometoj kun po 4-6 litoj, kaj renkontiĝos por manĝoj kaj aliaj gravaj kongresludoj en aparta domo. Povos aliĝi Esperanto-parolantoj ĝis inkl. 13-jaraj. Por ricevi la (baldaŭ eldonotan) aliĝilon, oni povas jam skribi al la konstanta kongresa adreso en Roterdamo.


Ĉirkaŭkongrese ankaŭ en Pollando kaj Norvegio. Krom la antaŭkongresaj aranĝoj en Svedio mem, kongresanoj povos partopreni ankaŭ en Oficiala Antaŭkongreso en Gdansko (1980 07 27 - 08 01), unu el la plej belaj kaj interesaj urboj de Pollando. La temo de la aranĝo, kiun traktos prelegoj kaj vizitoj tra la urbo, estos "Folkloro". Kaj kompreneble, kun tia temo, ĉe la Antaŭkongreso en Gdansko ne mankos ... dancigado, i.a. per balo. Estos ebleco aliĝi al ŝipvojaĝo de Gdansko al Stokholmo por la Universala Kongreso.

La norvega ĉefurbo Oslo proponas tritagan (1980 08 10 - 12) Oficialan Postkongreson, kiu inkluzivos ŝipekskurson, distran vesperon kaj vizitojn al muzeoj, vikingaj ŝipoj, skisaltejo kaj kastelo. La nombro de lokoj estas limigita. Por aliĝilo skribu al Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo 1, Norvegio. La stokholma LKK preparas plurajn postkongresajn ekskursojn en Svedio mem. Detalojn pri ili vi legos en niaj venontaj komunikoj.

Subtenu la Adoptan Kason! Interalie pro la financa helpo, kiun ĝi provizis por ke tri afrikaj landoj povu reprezenti en Lucerno, per po unu juna kongresano, la Adopta Kaso dum tiu UK atingis modestan deficiton. Kvankam, pro la ĝisnunaj donacoj de aliĝintoj al la 65a UK en Stokholmo, la saldo denove estas pozitiva, ĝi ne estas kontentige granda. Tamen, se ĉiu aliĝinto de nun aldonus, ni diru, dek guldenojn (aŭ pli) al sia kongreskotizo, la perspektivoj fariĝus treege bonaj. Bonvolu pensi pri tio!

Afiŝo elĉerpita. La afiŝo "Svedio estas mirinda", eldonita por propagandi la 65an UK, jam elĉerpiĝis ĉe LKK. Kvantoj eventuale troviĝas nur ĉe kongresaj perantoj kaj landaj asocioj. Ankaŭ la Unua Bulteno baldaŭ malaperos. Ĝi plene elĉerpiĝis ĉe LKK kaj preskaŭ atingis sian lastan milon ĉe la kongresa administracio.

Statistiko. Ĝis la 19a de decembro registriĝis 464 kongresanoj el 40 landoj.



La stokholma urbodomo eniris la emblemon de la 65a UK

Germana Demokratia Respubliko

- "Skandalo en la lingvoscienco" — tiel epiteto lingvistoj en Leipzig la ignoradon de la fenomeno Esperanto fare de lingvosciencaj rondoj tra la mondo, post kiam ili havis la okazon persone observi la funkciadon de la Internacia Lingvo inter diverslandaj (orienteŭropaj landoj plus Italio, Japanio kaj Svedio) diskutantoj. La okazo por tiu malkovro — por ili sensacia, por ni memkomprenebla — estis seminario pri socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, en Bad Saarow, GDR, fine de novembro, kun trideko da partoprenantoj. La mirigitaj gastoj de la seminario, kiun aranĝis Centra Laborrondo Esperanto ĉe la Kulturligo de GDR, estis prof. Werner Reinecke, estro de la sekcio Fremdaj Lingvoj de la Universitato Karl Marx en Leipzig, kaj du liaj kolegoj.

Britio

- Okaze de la lasta parlamenta baloto, Skota Federacio Esperantista sendis demandaron al la kandidatoj en Skotlando. El 213 kandidatoj alskribitaj, 45 respondis. El tiuj 45, la plimulto respondis jese al tri demandoj: 1) pri instruado de internacia lingvo kiel dua lingvo al homoj el ĉiuj nacioj; 2) pri instruado de Esperanto kiel nedeviga ekstra lingvo; kaj 3) "ke ne estu diskriminacio kontraŭ parolantoj de minoritata lingvo, kiel ekz. la gaela, kaj ke akcepto de neŭtrala internacia lingvo helpus protekti iliajn rajtojn". Krome, pli ol triono deklaris sian pretecon aliĝi al poresperanta parlamenta grupo.

Aŭstralio

- Revigliĝis la agado en la ŝtato Sud-Aŭstralio, kie lastatempe restarigita grupo organizis ekspozicion en elementa lernejo apud Adelaide. Sekvis parolado de unu grupano kun la rezulto, ke la lernejestro mem eklernis kaj planas enkonduki la instruadon de Esperanto en sian lernejon.

Kanado

- Pli ol kutime viglas la kanada Esperanto-movado lastatempe. Tio facile konstateblas ankaŭ en la utila, grafike senpretenda *Membrolisto/Librolisto 1979* de la Kanada Espe-

ranto-Asocio. Tiu grandformata broŝuro enhavas ĉ. 240 adresojn de la membroj de KEA, centon da adresoj de "amikoj de Esperanto" kaj — plej interese — 89 adresojn de la anoj de koresponda Esperanto-kurso (verŝajne tiu oficiala kurso de la Edukministerio de la provinco Brita Kolumbio, pri kiu ni skribis en nia numero de januaro 1979, p. 7). Se landa asocio sukcesas arigi amikojn kaj kursanojn en nombro preskaŭ egala al la asocia membraro, tio devus signifi progreson kaj bonan estontecon. La broŝuro unuafoje anoncas alian novaĵon: s-ro C.E. Carson, membro de KEA (ankaŭ de UEA), donacis al la kanada asocio la sumon de 50 000,00 kanadaj dolaroj (pli ol 80 mil guldenoj).

Usono

- La forta radiostacio WBBM, Ĉikago, posedata de la reto CBS, intervjuis prof-on Richard E. Wood, redaktoron de *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*. La intervjuo daŭris tutajn dek minutojn — ne kutime longa seninterrompa programero ĉe tiu stacio, kiu tuttage disaŭdigas nur novaĵojn. Wood deklamis la poemon "Ho mia kor'" kaj dulingve diktis la telefonnumeron de Esperanto-Societo de Ĉikago. Ĉikaganoj rapide kaj grandnombre reagis — inter ili, ankaŭ esperantistoj kiuj antaŭe ne sciis pri la ekzisto de loka grupo. La Societo okazigas daŭran telefonkurson de Esperanto, atingeblian tage kaj nokte. La Societo kaptis la okazon de prelegvizito de Wood por unuafoje fizike kunvenigi la anojn de la telefona kurso ĉe ekzerca kaj progresiga klaso gvidata de li.

Fake



- Infandesegnaĵoj: La originalan formon de trajno havis internacia ekspozicio de infandesegnaĵoj en Oulu, Finnlando. La ekspozicion aranĝis la loka Esperanto-societo por la Internacia Jaro de la Infano. Alvenis 1500 desegnaĵoj el 24 landoj, el kiuj Argentino estis la unua ne nur laŭ alfabeto vico sed ankaŭ laŭ la nombro de kontribuantoj — 332 entute. La ekspozicio estis oficiale akceptita programero por la Tagoj de Oulu en la komenco de septembro. Vizitis ĝin kelkaj miloj da rigardantoj, kaj informis pri ĝi kaj samtempe pri Esperanto la lokaj gazetaro kaj radio. En la inaŭgura festo parolis interalie la vicurbestro de Oulu, Matti Rossi, kiu dankis esperantistojn pro ilia grava laboro kaj partopreno en la Tagoj de Oulu. Por la realigo de la ekspozicio la loka Esperanto-societo ricevis subvenciojn de la ŝtato kaj la urbo.

Homaj rajtoj

- Dum la pasintjara Japano Esperantista Kongreso fondiĝis Esperantista Societo por Homaj Rajtoj, kies celoj inkluzivas helpon al politikaj malliberuloj, luktadon kontraŭ diskriminacio kaj la firmigon de rajtoj de esperantistoj. Por pliaj informoj kontaktu s-inon Naoko Hata, Ŝonan 3-7-22, Sagamihara-ŝi, 228 Japanio.

Unuiĝintaj Nacioj

- La 27a Pleno de la Monda Federacio de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj, kiu kunsidis en oktobro en Barcelono, akceptis rezolucion proponitan de sia nov-zelanda filio, laŭ kiu MFAUN "... invitas ĉiujn Asociojn pri UN kunlabori kun Esperanto-asocioj pri instigoj al edukaj instancoj kaj organizaĵoj en siaj landoj enkonduki aŭ plivastigi la instruadon de Esperanto." Ĉe la pleno Universalan Esperanto-Asocieton reprezentis Llibert Puig i Gandia kaj Joan Guinón i Roset (antaŭa oficisto de la Asocio).

Vortaroj

- Komerca banko en Verona (Italio) donis al la loka Esperanto-grupo subvencion de dek milionoj da italaj liroj (pli ol dudek mil guldonoj), por eldoni italian-Esperantan vortaron. Ne estas al ni konate, ĉu eblos utiligi tiun sumon por rapidigi la eldonon de la granda (ambaŭdirekta) vortaro, kiun ekpreparis Stefano La Colla kaj finpretigas Carlo Minnaja k.a., sub la gvido de Itala Esperanto-Instituto. Ĉiukaze, Italio estas la sola lando, kun forta movado, kiu jam de multaj jaroj disponas pri nenia Esperanta vortaro.

- Laŭdire aperis pasintjare dua eldono de la dudirekta litova-Esperanta vortaro de Gutmanis kaj Jaunvalks. Dume, manuskripton de la unua E-turka vortaro ĵus kompletigis Hayrettin Dural, prezidanto de Turka Esperantista Asocio.

Kabaredoj

- Inter la elstaraj tradicioj de la pariza Esperanto-movado estas la esperantista kabaredo. Tiun tradicion animis ĉefe Raymond Schwartz, per la Verda Kato en la dudekaj jaroj kaj la Tri Koboldoj en la kvindekaj. Komence de 1978 inaŭguriĝis la Ruza Kruĉo sub gvido de la pro-

fesia kanzonisto Ĵak le Puil, kaj ĝia kunlaborantaro baldaŭ fariĝis internacia kun kontribuoj el Svislando, Italio kaj Nederlando. La Ruza Kruĉo nuntempe sin prezentas unufoje monate en la restoracio "L'Emeraude" (35 bd. Bourdon). Pliajn informojn povas disponigi s-ro le Puil (5 pl. Lavoisier (61), F-93380 Pierrefitte-sur-Seine, Francio).

Informado

- Tre ampleksa artikolo pri Esperanto en la porvirina paĝo de la

brita ĵurnalo *Guardian* (numero de la 10a de decembro 1979) montras, ke kelkaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto (maltaŭga por poezio, senkultura k.s.) ankoraŭ bone fartas. Oni almenaŭ povas kontente citi ĝian takson de la tutmonda esperantistaro (16 milionoj). Pli modestaj, sed tamen pli kompetentaj estas lastatempaj mencioj pri Esperantaj temoj (ekz. en n-ro 16 de 1979 pri *LPLP* kaj la anglalingva esplorbibliografio de Tonkin) en la prilingva novaĵletero *Alsed* de Unesko kaj la Internacia Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj.

Persone

Neergaard

- Pro sia agado en la evolulandoj, nia membro d-ro Paul Neergaard elektigis distingito de *Explorers' Club* (Klubo de esplorantoj), Novjorko — tiu renoma societo, inter kies membroj troviĝis Peary, Amundsen, Byrd, Nansen, Piccard, Lindbergh, Heyerdahl, Hillary kaj la unuaj astronautoj. Prof. Neergaard jam estas membro de pluraj diverslandaj sciencaj akademioj.

Novobilský

- En la faka artikolaro *Sborník Pedagogické Fakulty* 1979 (Prago) aperas en la unua loko preskaŭ 20-paĝa referaĵo de la aŭtoro de *Skizo pri la Esperanta literaturo* (1956), Vlastimil Novobilský, pri "Informatiko kaj la problemoj de la internacia planlingvo en la epoko de scienca kaj teknologia revolucio". La libro estas jara volumo de la Pedagogia Fakultato en Ústí nad Labem.



- Setälä: D-ro Vilho Setälä, honora membro de UEA, la 12an de decembro 1979 ricevis unikan rekonon de Esperanto-Asocio de Finnlando, kies honora prezidanto li estas: specialan memormedalon (vidu ĉi-supre), kiun formis konata finna skulptisto Heikki Varja. Setälä, kiu la 4an de aprilo ĉi-jare fariĝos 88-jara, lernis Esperanton en 1907, kaj aktivas en la Movado de post 1911. Li estas jam ses jardekojn unu el la plej elstaraj esperantistoj en Finnlando kaj en la internacia Movado, membro de la Akademio (antaŭe Lingva Komitato), de post 1921, vortaristo, pedagogo, verkisto, esperantologo, eldonisto... La medalo, el bronzo, kiu havas diametron de 7 centimetroj, eldoniĝis en 500 ekzempleroj kaj kostas 120 finnajn markojn. Eventuala profito iros al aparta Fondaĵo Vilho Setälä ĉe Esperanto-Asocio de Finnlando. Pliajn detalojn petu ĉe la ĉefdelegito de UEA: Harri Laine, Karhuniityntie 17, SF-02810 Espoo 81, Finnlando.

Vi preskaŭ malfruas

kun via abono al KONTAKTO por ĉi tiu jaro!
Vidu apude: jam aperis la lasta numero por 1979, kaj oni jam estas profunde en la redaktaj laboroj por la unua ĉi-jara numero. Ĉiu juna membro de UEA/TEJO ricevas la revuon aŭtomate. La novaj junaj membroj (10–18-jaraj) ricevos ankaŭ KONTAKTON dum du jaroj kontraŭ unujara kotizo. Se vi ne estas inter tiuj du membrokategorioj, rapidu, vi malfruas!

kontakto



La Tria Mondo... kaj aliaj



Oficiala Informilo

N-ro 531

NOVA GRANDA HEREDAĴO

Kiam en majo 1979 mortis la malnova honora membro de Germana Esperanto-Asocio Kurt Schönrich en Wiesbaden (vidu la nekrologon en la juli-aŭgusta numero, p. 137), li postlasis al la Movado grandan heredaĵon. La parto por UEA – kiu aperas en la ĉi-paĝa listo de donacoj – estas 50 000 germanaj markoj. Tiel s-ro Schönrich, kiu pli ol 60 jarojn aktivis por Esperanto (kiel prezidanto de la loka grupo, kiel delegito de UEA, kiel kursgvidanto ktp.) je sia morto ankoraŭfoje pruvis sian fidon pri la perspektivoj de la lingvo – al kiu li dediĉis sian tutan vivon – kaj, specife, sian konvinkon pri la rolo de UEA en la Esperanto-movado. Parte dank' al tiu grava testamentaĵo, la Asocia Kapitalo de UEA, kiu en la lastaj jaroj konsiderinde firmiĝis, denove montras signifan kreskon en la fino de 1979.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: W. Spaander.

SOCIETO ZAMENHOF 1980

DANL: 10 P.O.P. Andersen. KAN: 11 Thomas M. Hess; 12 Betty Salt. NED: 13 J. Flach; 14 C.J. Knoop; 15 E.S. Otto; 16 Gerard M.B.J. Peet; 17 W. Rodenhuis. SVED: 18 Bertil Bengtsson; 19 Henrik Karlsson; 20 Edla Nilsson; 21 Greta Nordström; 22 Einar Rasmussen; 23 Jan-Olof Svensson. SVIS: 24 Margrit Guldin; 25 Otto Walder. FR GERM: 26 Louis Beaucaire; 27 Harry Bily; 28 Ellen Eggers; 29 Adolf Mosch; 30 Hans Schütt; 31 Richard Schulz; 32 Bruno Vogelmann; 33 Elise Woller.

DONACOJ 1979 (Gld.)

ĝis la 30a de novembro

ASOCIA KAPITALO: FR Germanio: Heredaĵo K. Schönrich 55 573, 75. Sumo ĉi-jara 58 073, 75.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Diversaj malgrandaj 5,40. Sumo ĉi-jara 4018,15.

ekzameno
e Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 31

(pri la demando vidu nian decembran numeron)

a. *La Struvelpetro: beletaj rakontoj kaj komikaj bildoj* de d-ro Heinrich Hoffmann estis esperantigita de Jacob D. Applebaum por la unua eldono de 1921. La libro estis republikigita en 1971.

b. *La skolta mondo* estas la kvaronjara organo de Skolta Esperantista Ligo (SEL), fondita en 1918 de Alex-

FONDAĴO CANUTO: Belgio: Germaine Wolff 1 000,00. Sumo ĉi-jara 2 870,61.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: FR Germanio: C. Spruch 111,10. Nederlando: J. Th. de Goeij 10,00. Svedio: A. Nilsson 47,34. Sumo ĉi-jara 12 145,56.

FONDAĴO TEJO: Institucio Hodler 500,00. Diversaj malgrandaj 4,46. Sumo ĉi-jara 681,14.

ĜENERALA KASO: Aŭstralio: I. Grahovac 10,85. Britio: R. Smith 10,64. Nederlando: J.Th. Janssen 45,00. Anonima 72,70. Diversaj malgrandaj 19,16. Sumo ĉi-jara 6 831,18.

PATRONOJ DE TEJO 1979:

29 U.J. Moritz, FR Germanio.

PATRONOJ DE TEJO 1980:

1 Ĝ. Harabaĝiu, Usono. 2 G.W.J. Duivis, Nederlando. 3 M. Meywes, Nederlando. 4 L. Anjer, Norvegio. 5 C. Darbellay, FR Germanio. 6 U.J. Moritz, FR Germanio. 7 P. Zlatnar, Jugoslavio.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

ander William Thomson kaj aliaj britaj skoltestroj.

c. Zamenhof tradukis la *Fabeloj* de la dana verkisto Hans Christian Andersen, sed ili estis publikigitaj nur post lia morto en kvar volumoj inter 1923 kaj 1963.

ĉ. *Terminaro por infan-ludoj* estis verkita de Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj (SBET) kaj eldonita la unuan fojon en 1942. Foto-represo aperis en 1960.

d. *Tra dezerto kaj praarbaro* de la eminenta pola verkisto Henryk Sienkiewicz estis elpoligita de Mieczysław Sygnarski kaj publikigita en 1978.

e. *Grajnoj en vento* estas lerneja organizaĵo gvidata de Marcel Erbeta el Svislando. Rondo de lernejoj infanoj eldonas trifoje jare komunan gazeton enhavantan originalajn ilustraĵojn kaj tekstojn pri la vivo de la infanoj.

5,5 procentoj de la membraro de UEA estas malpli ol 25-jara, 0,4 estas malpli ol 18-jara. Jen du procentaĵoj, kiuj postulas nian atenton en la nova jaredko. Helpu altigi ilin. Rekomendu la servojn de TEJO al la gejunuloj en via loko, regiono ...



kontakto

Lasu al iu juna homo ŝteli vian propran ekzemplon de "Kontakto". Se vi ne havas ĝin, abonu ĝin tiucele. Kuraĝigu gejunulojn membriĝi en TEJO. La Movado, kiu rigardas al la estonteco, devus paŝi pli juna en la novan jardekon!



kaj publikigita en 1972 en Usono kun la ilustraĵoj de Ernest H. Shepard el la originala angla eldono de 1926.

h. *Juna amiko*, kvarmonata ilustrita magazino kun internacia redaktaro, havas plurajn rubrikojn celantajn la edukon kaj amuzon de infanoj, kiuj komencas lerni Esperanton.

f. *La knaboj de Paŭlo-strato* de Ferenc Molnár estis esperantigita de Ladislao Spierer (Somlai) kaj eldonita en 1937. En 1978 aperis foto-represa eldono.


g. La organizaĵo nomata "Geonkloj Esperantistaj" celas helpi gejunulojn lerni Esperanton per korespondado

kun plenaĝuloj. Tiuj ĉi kuraĝigas la infanojn, donante al ili eblecon praktike uzi la Internacian Lingvon. La administranto de "Geonkloj Esperantistaj" estas J.H. Sullivan el Britujo.

ĝ. *Winnie-la-Pu* de la brita aŭtoro A.A. Milne estis elangligita de Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin

DEMANDO 32 (la respondo aperos en nia februara numero)

La unua Adamo rolis en Genezo en la Malnova Testamento, kiun d-ro L.L. Zamenhof tradukis el la hebrea originalo. Tiu virnomo, en la formo



JAM PRETAS LA UNUA NUMERO DE

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet/STAFETO
Ĉefredaktoro: Stefan Maul

40 paĝoj DIN A4 - riĉe ilustrita
11 kajeroj jare - jara abono:
49,50 gmk aŭ 800,- b.fr.

Ekde januaro 1980 aperas ĉi tiu revuo kun multaj interesaj artikoloj el ĉiuj kampoj de moderna vivo: politiko, ekonomio, kulturo, scienco, tekniko, modo, kuirarto, sporto, turismo kaj multaj aliaj. Kun apartaj paĝoj por infanoj kaj junularo, kun distraĵoj, noveloj, satiroj, enigmoj kaj konkursoj.

Propraj kunlaborantoj en pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj.

MONATO estas la revuo por esperantistoj de ĉiu aĝo, ĉiu medio, ĉiu lando. Tuj abonu!



Al eldonejo TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio

poŝtĉekkonto 000-0422856-33

Jes, ankaŭ mi volas legi la revuon MONATO.

Mi abonas por 1 jaro ☐

Nomo: _____

Adreso: _____

Skribu maŝine aŭ preslitere

SE VI ANKORAŬ NE ESTAS ABONANTO DE "MONATO", PETU PROVEKZEMPLERON KONTRAŬ DU INTERNACIAJ RESPONDKUPONOJ. (VI TAMEN MEMORU, KE UNU PERSONO POVAS UNUFOJE — NE PLURFOJE — FARI TI-AN PETON). DANKON!

Adam aŭ Adamo kaj ankaŭ kiel parto de familia nomo, aperas sufiĉe ofte en la literaturo kaj historio de Esperanto. Ĉu vi povas identigi la sekvajn Adamojn aŭ la verkojn pri ili?

a. La filo de tre eminenta esperantisto havis la saman profesion kiel lia patro kaj fariĝis ĉefo de la oftalmologia fakto en varsovia malsanulejo. Samprofesiulino estis ankaŭ lia edzino, filino de lernejamiko de la patro de Adamo. Pri kiuj homoj temas?

b. De la sama lando de la Adamo en (a) estas poeto, kies ĉefverko, *Pan Tadeusz* (1834), estis esperantigita fare de alia samlandano sed ne samtempano, Antoni Grabowski. Kiu estas la aŭtoro kaj kiel nomiĝas lia verko en Esperanto?

c. Ni ankoraŭ ne forlasas la landon de la unuaj du Adamoj. Scienculo, kiu estis fakulo pri la statistiko, okupiĝis pri volapuko kaj aliaj planlingvoj, kaj pri Esperanto. Li aktivis en sialanda Esperanto-movado, verkis nacilingve propagandajn artikolojn, lernolibrojn de Esperanto kaj historion de internaciaj lingvoj. Lia ĉefa verko en Esperanto estas *Historio de Esperanto 1887-1912*, eldonita en 1913, represita en 1979.

ĉ. Eugène Aristide Alfred Adam (1879-1947), kiu naskiĝis en Normandio, Francio, aktivis en la labo-

rista Esperanto-movado kaj fondis post la unua mondmilito internacian ne-neŭtralan peresperantan organizaĵon, kiu ankoraŭ ekzistas. Laŭ kiu pseŭdonimo li estas pli bone konata? d. Instruisto, verkis poemojn en sia gepatra lingvo, la estona, kaj ankaŭ originale en Esperanto. Tiuj ĉi aperis en *Literatura Mondo* kaj aliaj revuoj kaj ankaŭ en la poemkolekto *Dekdu poetoj* (1934).

e. La nomo Adamo aperas en la titolo de triakta teatraĵo, originale verkita en Esperanto fare de hispana esperantisto loĝanta en Meksikio. La teatraĵo baziĝas sur la Biblia rakonto, kaj krom Adamo kaj Eva, rolas en ĝi ankaŭ Habelo kaj Kaino.

f. Adamo ĉefrolas kune kun Eva kaj Lucifero ankaŭ en alegoria drama poemo de Imre Madách (1823-1864) temanta pri la lukto inter la bono kaj la malbono. Tiu ĉi ĉefverko de la hungara literaturo estis dufoje tradukita en Esperanton. Kiel ĝi nomiĝas kaj kiu esperantigis ĝin?

g. En romaneto originale verkita en Esperanto, Adamo, juna gimnaziano, enamiĝas al Eva, knabino laboranta en foiro kun Majstro Baltazar, la sortodivenisto, kaj Fridolin, la arlekeno. Kiel nomiĝas tiu ĉi libro, kies aŭtoro estas samlandano de la tradukinto sub f?

16-jarulino volonte korespondus tutmonde: Stefka Sestrimska, Str. Dunav 4, Rakitovo, Pazarĝik, Bulgario.

Teresa Bellalta Cusso gvidas Esperanto-kurson en filatela medio kaj serĉas korespondantojn tutmonde por siaj gelernantoj, kiuj deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Bonvolu skribi al: Centro Filatélico Córdoba, Casilla de Correo 241, 5000 Córdoba, Argentino. Respondo al ĉiu!

Deziras korespondi 15 lernantoj (11–13-jaraj) kaj 8 inĝenieraj studentoj. Robert Alberg, Kraus-str. 12, Tel Aviv, Israelo.

Esperantaj libroj-revuoj. Argentinaj neuzitaj poŝtmarkoj. Moneroj. Turismaj broŝuroj. Ofertas: Luis Vicino, Maza 1450, 1240 Buenos Aires, Argentina Respubliko. Interŝanĝe deziras maksimum-kartojn.

16-jarulo ŝatus korespondant(in)on, kiun li renkontus en 1980 (julio - aŭgusto) en Grésillon. Nesperta, ŝatanta arton kaj naturon: Eric Basoul, 10 rue J.J. Rousseau, F-47800 Miramont, Francio.

Serĉas kontakton kun fabrikoj de projekciiloj (8-S8-9,5-16) kaj elektronikaj elementoj. Daniel César Vicino, Castro Barros 1433, 1237 Buenos Aires, Argentina Respubliko.

Unu tago en unu lando: Sendu tajpitajn raportojn al *Franca esperantisto*, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio. Kompenso por aperigitaj tekstoj.

S-ino Inah de Aguiar Nunes (51-jara) serĉas korespondantojn. Adreso: João Berutti 78, BR-90000 Porto Alegre, R.S., Brazilo.

Helpon de usonaj esperantistoj petas la kamboĝano: Kang Sanerat, P.O. Box 5, Room 30, Building 4, Refugees Camp of Aranya Prathet, Tajlando.

Por muzea ekspozicio pri Zamenhof materialojn (originalojn aŭ kopiojn) petas Bjalistoka Filio de Pola Esperanto-Asocio. Ni rekompencos per Esperanto-libroj aŭ fotoalbumo pri la naskiĝurbo de Zamenhof. Adreso: Pola E-Asocio, Filio en Bjalistoko, skr. poczt. 67, PL-15-950 Białystok, Pollando.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 gld. (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem.

Instruistoj bezonataj por scienco kaj tekniko. Mi komencas organizi korespondan kursaron, por kiu la studentoj (15–25-jaraj) pagos. Interesitoj sendu skizojn de proponitaj kursoj. Mi kunordigos la proponojn kaj respondos kun specifaj petoj. Inĝ. R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501, Chicago, IL 60657, Usono.

Kovrilo por Jarlibro, librokatalogo, Statuto k.a., el fortika blua plasto, kun blanka surpriso de la mallongigo "uea". Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo: 1,80 (por Nederlando 2,12) gld., plus sendokostoj 10%.

Ĉikago invitas bildkartojn por ekspozicio en la Urbodomo dum la Semajno de Internacia Amikeco, februaro 1980. Ĉiu (kiu skribas sufiĉe klare!) ricevos nian Kalendaron de I.A., 1887 – 2059. Janet Bixby, Prez., Esperanto-Societo de Ĉikago, Box 11958, Chicago, IL 60611, Usono.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio aŭ Greklando, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

18-jarulo volas korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn: Marko Truszkowski, Ul. Gabińska 39, PL-09-500 Gostynin, Pollando.



PRI LA TUTGLOBA HOMARANIĜO

Multaj el vi verŝajne legis la tutpaĝan anoncon "Manifesto de la Tutgloba Homaraniĝo" en la oktobra numero de ĉi tiu revuo. Iuj reagis al tiu anonco, diras la redaktoro de la revuo, kaj li eble metos en ĉi tiun numeron ankaŭ unu el tiuj reagoj. Konsentite, ke la anonco venis al vi iel subite, sen preparoj, sen sufiĉaj klarigoj. Pensu tamen, ke mi, la anoncanto, devus havi iujn profundajn kialojn, por el miaj limigitaj personaj monrimedoj investi mil guldenojn anoncante en ĉi tiu revuo. La klarigo estas simpla: Esperanto estas esenca parto de mia vivo, same kiel ĝi estas de la via. Kaj, mi provas kaj sukcesas kombini tiun idealon kun la alia granda idealo de mia vivo. Ĉu vi provis kombini viajn idealojn? Se oni jam havas plurajn, ili devus esti bone kombineblaj. Alie, io ne funkcias — la homo aŭ la idealoj. Nun pri la esenco de la anonco:

La japana Budaisma sekto Nichiren Shoshu predikas mirindan humanisman filozofion, kiu celas al la Globa Familio de la Homaro, al Mondkulturo, Spirita Mondrevolucio. Mi, Miro Revantes, fondis la Homaranismon — ĝiaj bazaj ideoj ne devus impresi fremde al la esperantistoj —, la sekton, kiu akceptas la teorion de Nichiren Shoshu en ĝia tuteco, sed asertas, ke ties celoj estas praktike nerealigeblaj sen Esperanto. Konforme al la nobla miljara kutimo en Japanio, mi postulis debaton. La debato ne okazis. Mi bezonas vian helpon, por ke tiu debato okazu. Skribu amase tiucelajn leterojn al: **Nichiren Shoshu Internacia, 1-33-11 Sendagaya, Shibuya-ku, Tokio 151, Japanio.** Kolektu kiel eble plej multe da subskriboj por via letero. Mi do ne postulas multon de vi. Mi ofertas multon! Imagu la sekvojn de la debato, kiuj povus esti tio, ke milionoj da membroj de Nichiren Shoshu en 90 landoj subite komencus subteni Esperanton. Via letero devus enhavi jenon: **En la nomo de la Homaranismo, mi(ni) postulas debaton!**

Antaŭdankon pro via subteno!

Miro Revantes

LIGO DE SAMSEKSAMAJ GEESPERANTISTOJ



Anoj jam en 27 landoj

Reto de 24 gastigantoj

Dumonata bulteno: **FORUMO**
kun korespondamika paĝo

Internacia respondkupono al Pieter Anton de Graaff,
Kettinbrugweg 1-3, 7552 CW Hengelo, Nederlando.
Konfidenco respektota.

Krommenie 1980

Esperanto-Societo "Unueco", Krommenie/
Assendelft, Nederlando, organizas, en la kadro
de la 700 jaroj de Krommeniedijk,

INTERNACIAN

ESPERANTO-FERIOSEMAJNON

de la 10a ĝis la 17a de aŭgusto 1980 (kun ekskursoj, ekz. al Amsterdam, Volendam). Petu informojn kaj aliĝilon ĉe: Sekr. de Unueco, Gagarinstr. 104, 1562 TD Krommenie, Nederlando. Prezo: 220 guldenoj. Limdato: 1980 05 01.

GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO

historio
literaturo
metodologio

GRAVAJ STUDILIBROJ!

Gvidlibro por supera ekzameno (red. A. Pechan)
donas riĉajn, tamen koncizajn informojn pri la
historio, literaturo kaj instrumentado de Esperanto.
370p., 19cm. Prezo: 15,— gld.

Baza Literatura Krestomatio (red. V. Benczik)
enhavas 128 tekstojn de 56 Esperantaj aŭtoroj, de
Zamenhof ĝis Valano. 266p., 19cm. Prezo: 13,80 gld.

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO

Labori por du mastroj

KAJ — KONTRAŬ DUONA SALAJRO
(por ke tiameniere la titola ŝerco de ĉi tiu anonco fariĝu pli kompleta)

Sed serioze nun: Ekde marto 1980, la jam konata movada lernejo — Volontula Servo de UEA/TEJO — serĉas novan lernanton, kiu pretus labori en Roterdamo dum unu jaro. Ŝi aŭ li laborus duontempe por UEA, kaj duontempe por TEJO, ĉefe pri ties eksteraj rilatoj. La ĉefa tasko tiurilate estos prepar- kaj post-laboroj pri seminario kun temo "Aplikante Esperanton" okazonta en junio 1980. Temus ankaŭ pri respondado al informpetoj, pri rilatoj kun internaciaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj kaj pri tuta amaso da aliaj ekscitaj kaj ĝueblaj taskoj. Esencas kapablo memstare labori. Nepras bona kono de Esperanto. Gravas rego de la angla aŭ la franca. Necesas kapablo tajpi. Devas temi pri personoj ne pli ol 29-jaraj. Pliaj detaloj estas riceveblaj de la CO de UEA/TEJO.



**Tibor
Sekelj**

Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo

Tibor Sekelj estas tute specifa aŭtoro en la Esperanta literaturo. Li estas esplorvojaĝanto, kiu en ĉiu sia poŝo havas rakonton el alia mondparto. Kiam rakontas homo, kiu konas preskaŭ ĉiun anguleton de la mondo, tio devas esti tute fascina legaĵo. Tia estas ankaŭ la nova volumo de Sekelj:

Kumeŭaŭa — la filo de la ĝangalo, de Tibor Sekelj.
Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 96p. Ilus.
21cm. Belliteratura eldonserio 42. ISBN 90 6336 018 5.
Prezo: 140 belgaj frankoj.



TK/Stafeto, Heideweg 20,
B-2120 Schoten, Belgio.
Ĉiujn TK-eldonaĵojn liveras
ankaŭ Libro servo de UEA.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 59 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, libreccenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Literatura kaj scienca suplementoj

Jarabono: 440 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (30,00 guldenoj; por Nederlando 31,20 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska